

1981 majo

74-a jaro

n-ro 905 (5)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Budapeŝta filio de UEA ekfunkcias

(En ĉi tiu numero: Estrara Raporto 1980)

Vi trovos,

ke iam sufiĉis diri cent sepdek ses, por tuj ekpensi pri UEA kaj ĝia sola adreso en Roterdamo. Kvankam tiu numero ankoraŭ grave rolas en la vivo de la Asocio, la esperantistaro dum kelkaj lastaj jaroj devis lerni novajn adresojn de UEA. Unue venis "kvin" por marki la stratnumeron de la Grafika Centro de UEA en Antverpeno, poste aldoniĝis "tri sepoj", por indiki la adreson de la Nov-Jorka Oficejo en United Nations Plaza, kaj nun necesas lerni la numeron "cent naŭdek tri", kiu indikas la poŝtkestan nomon de la Budapeŝta Esperanto-Centro de UEA. Cetere, eblus aranĝi interesan "ekzamenon E" pri la famaj adresnumeroj de la diversaj movadaj oficejoj tra la mondo. Vi eble jam forgesis la iaman gravecon de la londona numero 77, sed vi jam delonge devis konsciiĝi pri la eterneco de la pekina P.O. Kesto 77. Ne malpli eternaj estas ankaŭ la numeroj 67 en Parizo kaj 140 en Londono. Se ni ankoraŭ demandas vin, kie troviĝas la poŝtkesto 66, stratnumero 54 aŭ poŝta kodo 479, vi verŝajne ne sukcesos kolekti la maksimuman nombron da poentoj en ĉi tiu ludo.

Eĉ se ni ne dirus tion, vi certe trovos la Estraran Raporton en ĉi tiu numero, ĉar ĝi inundis 14 el la disponeblaj 20 internaj paĝoj. Kelkrilate ĉi tiu raporto malsamas al la antaŭaj. Pluraj ĉapitroj suferas — feliĉe! — pro malobservo de la tradicia raporta rutino. Almenaŭ ni trovis sufiĉe da ekscitaj alineoj en la Raporto. Se vi atente legos ĝin, tio okazos ankaŭ al vi! Havu majan saluton!

Enhavo

- 81 Nova oficejo de UEA: Budapeŝto por scienco
- 82 Reklamado: Anoncoj estas duoble utilaj (S. Milojević)
- 83 Universala Esperanto-Asocio: Raporto de la Estraro pri la agado dum 1980:
Enkonduko; Ĝeneralajoj; Administrado
- 85 Financo; Institucio Hodler '68
- 86 Revuo; Kongresoj
- 87 Informado
- 88 Eksteraj rilatoj
- 90 Kulturo kaj edukado
Junulara sekcio (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo)
- 92 Landa kaj regiona agado
- 93 Faka agado; Esploro kaj dokumentado
- 94 Finaj vortoj
Financaj aldonajoj al la Raporto:
Spezoj por la jaro 1980
- 95 Bilanco de UEA je la 31a de decembro 1980
- 96 Buĝeto de Universala Esperanto-Asocio por la jaro 1982
- 97 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 99 Anoncetoj
- 100 Anonco

La kovrilo

La kovrila foto de Zoltán Fejér montras la prezidanton de UEA (maldekstre) en interparolo kun s-ro Vilmos Sághy (dekstre), hungara ministro pri enlanda komerco, kaj s-ro Márton Lengyel (centre), direktoro de la Fremdultrafika Oficejo de Hungario. Lengyel estas mem esperantisto kaj al li oni multon ŝuldas pro la rekono, kiun Esperanto ricevis en la Monda Konferenco pri Turismo, pasintjare en Manilo. Kiel la titolpaĝa bildklarigo diras, ĉi tiu interparolo ligiĝis al la ekfunkcio de la Budapeŝta Esperanto-Centro. Tion pli detale raportas la enkonduka teksto de ĉi tiu revunumero.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenwg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto). Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). Legata en 102 landoj. Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo varias laŭlande. Petu de via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero 4,— gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1000, 1/2 p. 530, 1/4 p. 290, 1/8 p. 170, 1/16 p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:
ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri financo kaj administrado: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Vicprezidanto kaj estrarano pri planado, landa kaj regiona agado: d-ro Renato Corsetti, Via Strabone 1, I-00176, Roma, Italio; tel. (06) 29 26 07.

Vicprezidanto kaj estrarano pri kulturo kaj edukado: s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavik, Islando; tel. (91) 3 73 01.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23-274.

Estrarano pri informado kaj delegita reto: s-ino Ursula Grattapaglia, C.P. 04-0097, BR-70000 Brasília (DF), Brazilo.

Estrarano pri kongresoj kaj virina agado: s-ino Eliza Kehlet, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio; tel. (031) 51 46 36.

Estrarano pri faka agado: s-ro Petăr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario.

Estrarano pri esploroj kaj kunordigo de eksteraj rilatoj: prof. Humphrey Tonkin, Stouffer College House, 3700 Spruce St., Philadelphia, PA 19104, Usono; tel. (215) 382-5874.

Funkciuloj de Hungara Esperanto-Asocio kaj de UEA pozas por la nas-kiĝtaga foto de la Budapeŝta Esperanto-Centro pri Eldona kaj Scienc-tekna Agadoj (de maldekstre): T. Vaskó, I. Pethes, E. Barát, F. Szabó-Felső, G. Maertens, O. Haszpra kaj V. Sadler. (Fotoj de Zoltán Fejér)



NOVA OFICEJO DE UEA:

Budapeŝto por scienco

FINE DE MARTO, laŭ invito de Hungara Esperanto-Asocio, vizitis Budapeŝton la prezidanto de UEA, Grégoire Maertens, kaj la ĝenerala direktoro, Victor Sadler. Kvankam la ĉefa motivo de la vizito estis la lanĉo de la nova oficejo de UEA en Budapeŝto, la aranĝintoj kaptis la okazon por utilaj kontaktoj sur la kampo de turismo kaj por solena transdono de la Trofeo Fyne al HEA.

Post tiuj de Antverpeno (1976) kaj Nov-Jorko (1979), la Budapeŝta Esperanto-Centro de UEA pri Eldona kaj Scienc-tekna Agadoj (pli koncize: Scienca Eldona Centro) estas la tria oficejo de UEA fondita ekster Nederlando, t.e. aldone al la Centra Oficejo en Roterdamo. Estas jam klare, ke la "centrismo" epoko de UEA definitive forpasis kaj ke la Asocio rapide ekspansias — ne por transpreni aŭ anstataŭi la landajn movadojn sed por utiligi la disponeblajn laborfortojn kaj la favorajn cirkonstancojn (interalie financajn) en

diversaj mondpartoj por specifaj novaj agadoj: grafika, reprezenta kaj nun scienc-tekna.

Kial nun scienc-tekna oficejo, kaj kial ĝuste en Budapeŝto? Simpla rigardo en la Esperantan librokatalogon devus sufiĉi por konvinki ĉiun, ke la scienca kaj teknika aplikado de Esperanto plorinde lamas kompare kun ĝia beletra uzo. Per engaĝiĝo sur tiu kampo la Estraro de UEA nun montras, ke ĝi ne restis surda antaŭ la helpokrioj el Irano, kie la novaj lernantoj unuavice serĉas ĝuste tian literaturon. Por scienca eldona centro Budapeŝto jam havas plurajn avantaĝojn: signifa nombro da sciencistoj en la loka movado (kion pruvas la kajeroj *Sciencaj komunikaĵoj*), jam vigla eldona aktiveco de HEA kaj relative malaltaj produktokostoj por presaĵoj.

La reprezentantoj de UEA estis akceptitaj ĉe vicprezidanto de la Centra Sindikata Konsilantaro, s-ro J. Timmer, kiu promesis la apogon de la Sindikato, pere de Hungara Esperanto-Asocio, por la nova oficejo. (Kun s-ro Timmer estis tuŝitaj ankaŭ la temoj: internacia agado en sindikataj medioj kaj eventuala Universala Kongreso en Hungario.) Kun HEA estis subskribita detala kontrakto, kiu fiksas la jurajn, financajn k.a. kondiĉojn de la nova centro. Fine, okazis kunsidoj pri la konkretaj laborplano kaj proceduro sekvendaj en la venontaj monatoj. Partoprenis prof. Ottó Haszpra kaj s-ro András Lukács, kiuj akceptis la ĉefan ŝarĝon de la laboro. Inter multaj eldonprojektoj pritraktitaj, plej maturaj por eldono estas verkoj pri geologio, organika kemio kaj meteologio. Laŭ la interkonsento, la centro oficiale ekfunkciis la 1-an de aprilo.

Kiel konate, la ĵusa sukceso de Esperanto en la Monda Turisma Konferenco en Manilo (vidu nian januaran numeron, p. 2) estis grandparte rezulto de hungara iniciato. La prezidanto de UEA havis la okazon renkontiĝi kun la ministro pri enlanda komerco, s-ro Vilmos Sággy, kaj gratuli lin pro tiu paŝo. La renkontiĝo okazis en turisma ekspozicio "Vojaĝo 1981", inter kies standoj troviĝis ankaŭ unu pri Esperanto. Tie estis distribuata *Baza Esperanto-konversacio*, eldonita jam en 50 000 ekz. fare de la Hungara Fremdultrafika Oficejo. La broŝuro estis distribuita ankaŭ al vizitantoj de la Budapeŝta Printempa Festivalo, kiu



Subskribo de la kontrakto pri la Budapeŝta Esperanto-Centro, kiu ekfunkciis la 1-an de aprilo ĉi-jare

REKLAMADO:

Anoncoj estas duoble utilaj

ATENTA TRASTUDO de la spezokonto de UEA por 1980, fine de la Estrara Raporto en ĉi tiu numero, montros al vi, ke ĉiu numero de ĉi tiu revuo kostas pli ol dek mil guldenojn. Fakte, ankaŭ tio estas nur parto de la kostoj, ĉar tie ne estas enkalkulitaj salajroj de la homoj, kiuj redaktas kaj teknike prizorgas la revuon. Multaj en la Movado ŝajnas ne konscii pri tiuj kostoj. Ni konkludas tion el la fakto, ke al nia adreso tre ofte venas petoj senpage aperigi informojn pri turisma vojaĝo, semajnfina renkontiĝo, eldonota libro aŭ gazeto, kompletigo de onia filatela aŭ bildkarta kolekto, vendo de propre produktitaj ŝlosilringoj, subtasoj kun la verda stelo, T-ĉemizoj kun portreto de la Majstro kaj florpotoj kun la orlitera vorto "Esperanto". Oni petas senpagan diskonigon de siaj ideoj kiel "savi la mondon" kaj kiamaniere "definitive venkigi" la Internacian Lingvon. Oni facilanime forgesas, ke neniuj pago de ĉi tiu revuo estas senpage produkta, sed — male — ĉiu unuopa pago kostas ĉ. 500 guldenojn. La anoncoj en 1980 enspezigos preskaŭ 14 000 guldenojn, kaj do efektive pagis pli ol unu tutan numeron de la revuo. Vi povas imagi, ke tio estis tiel esenca kontribuo al la revua buĝeto, ke sen ĝi simple ne estus eble aperigi ĉiujn numerojn de la pasintjara kolekto. Ni do devas danki la kompletecon de la jarkolekto 1980 al niaj regulaj anoncantoj: Eldonejo TK/Stafeto, *Heroldo*, Mondharmonia Instituto, Kulturdomo Grésillon, Norvegaj Ŝtataj Fervojoj, Someraj Universi-

tataj Kursoj, *El popola Ĉinio*, Eldonejoj Ludovikito, Casterman kaj La Kritikanto.

Estas interese konstati, ke tiaj movadaj entreprenoj, kiel ekzemple Grésillon kaj Someraj Universitataj Kursoj, sukcesas buĝeti la reklamkostojn de siaj aranĝoj, dum la organizantoj de multekostaj turismaj vojaĝoj kaj la eldonantoj de altprezaj fotorepresaj libroj petas senpagan reklamadon. Oni do konsciu, ke la senpagaj anoncoj ne eblas, ĉar nia presisto ne konsentas senpage presi la revuon, nek la poŝto akceptas senpage distribui ĝin.

Aliflanke, vi certe konscias, ke nur la movada gazetaro vivas de la abonkotizoj, dum la monda gazetaro nuntempe vivtenas sin grandparte per pagitaj reklamoj. Kelkaj provoj dum la pasintaj jaroj montris, ke eblas varbi ekstermovadajn komercajn anoncojn por Esperantaj periodaĵoj. En la Jarlibro de UEA regule aperas pluraj tiaj reklamoj. Foje okazas simile pri la eldonaĵoj de la Universalaj Kongresoj. Pensu, ekzemple, pri la Kongresa Libro de Rejkjaviko antaŭ kvin jaroj. La malgranda Islando sukcesis plenigi ĝin per komercaj anoncoj, dum la ekonomie potenca Svedio pasintjare pene aĉetis du reklampaĝojn en la Kongresa Libro. Estas klare, ke la rezultoj de la anoncvarbado dependas unuavice de la atento, kiun ni dediĉas al tiu grava fonto de la enspezoj. Ĉu niaj legantoj vere konscias, ke UEA pretas doni ĝis 30-procentan makleraĵon al la varbintoj de komercaj reklamoj? Ĉu la lokaj kluboj konscias, ke varbinte unu tutpaĝan anoncon por ĉi tiu revuo eblas gajni por la klubo kaso 300 guldenojn? Tiel la reklamoj povas esti duoble utilaj — por la lokaj kluboj kaj por UEA. Ĉio ĉi ne koncernas nur nian revuon sed ankaŭ la aliajn eldonaĵojn de UEA. Pensu do pri ĉio ĉi, rerigardu al nia anonctarifo sur la dua kovrila pago kaj eventuale petu pliajn informojn de la Centra Oficejo de UEA.

allogas multajn eksterlandanojn. La Fremdultrafika Oficejo planas, ke venontjare tiu kultura manifestacio inkluzivu ankaŭ Festivalon de la Esperanta Teatro.) La Fremdultrafika Oficejo, kies direktoro, s-ro Márton Lengyel, akceptis la reprezentantojn de UEA, plenumas la rekomendon de Manilo ne nur per la eldono de tiu konversacia broŝuro. Baldaŭ ĉiuj bazaj hungaraj turismaj prospektoj aperos ankaŭ en Esperanto, diris s-ro Lengyel. La diskuto klare kondukis al la konkludo, ke la tempo maturiĝas por starigo de ankoraŭ unu faka oficejo de UEA — ĉi-foje oficejo turisma, kiu unuflanke vivtenus sin kiel vojaĝoficejo kaj aliflanke estus bazo por la reprezentado de la Esperanto-movado ĉe la internaciaj turismaj instancoj.

Ne mankis ekstera efiko de la UEA-vizito: Maertens estis intervjuita en turisma revuo "Mondvojaĝa magazino", Sadler por la en- kaj eksterlanda servoj de Radio Budapeŝto.

Ĉu ankoraŭ necesas klarigi, kial la Estraro de UEA ĉi-jare aljuĝis la Trofeon Fyne al Hungara Esperanto-Asocio?



Trofeo Fyne iris ĉi-foje al Hungara Esperanto-Asocio, kiu jam de pluraj jaroj estas unu el la plej dinamismaj landaj Esperanto-organizaĵoj.
(Foto: Zoltán Fejér)

Raporto de la Estraro

pri la agado dum 1980

1. ENKONDUKO

KIEL KUTIME dum la lastaj jaroj, oni decidis denove aperigi la Estraran Raporton en la revuo. Tio celas maksimume konigi ĝian enhavon al la membroj, kaj samtempe fari signifan finanĉan ŝparon al la Asocio.


La raporto traktas la laborperiodon inter la 1-a de marto kaj la 31-a de decembro 1980. Estonte, la estraraj raportoj traktos la laboron dum la kalendaraj jaro, same kiel tion faras la finanĉaj raportoj.

Tiun ĉi raporton ricevas ĉiuj individuaj membroj de UEA. Kontraŭ peto al la Centra Oficejo, la raporton povas senpage ricevi ankaŭ aliaj esperantistoj.

2. ĜENERALAJOJ

(1) **Statuto kaj Ĝenerala Regularo:** La Statuto, aprobita per Ĝenerala Voĉdono en januaro 1980, aperis en

**KIEL KRESKIS LA NOMBRO
DE LANDAJ ASOCIOJ
ALIĜINTAJ AL UEA DUM LA
PERIODO 1946–1980**



la Jarlibro 1980. Jarfine, ĝi estis eldonita en aparta 16-paĝa libreto, kiun ricevas ĉiu nova individua membro. La Ĝenerala Regularo ankoraŭ atendas revizion.

(2) **Honora Patrona Komitato:** En la komenco de la jaro ĝi ampleksis sep eminentulojn. La Komitato en Stokholmo decidis aldoni du novajn membrojn: la plant-patologon Paul Neergaard (Danlando) kaj la antropologon Tadao Umesao (Japanio).

(3) **Honoraj Membroj:** La Komitato elektis kiel novajn Honorajn Membrojn: Eŭgeno Aisberg (Francio), Nikola Aleksiev (Bulgario), Arthur Baur (Svislando), Pol Denoël (Belgio), Carlita Hueter (Francio), Irja Klemola (Finnlando), Lajos Kökény (Hungario) kaj Betty Salt (Kanado). Bedaŭrinde, E. Aisberg forpasis en oktobro, 1980.

(4) **Komitato:** 1980 estis elektojar, kaj el tio rezultis 87-persona Komitato (80 komitatanoj, 7 observantoj).

(5) **Estraro:** En Stokholmo elektiĝis nova Estraro sub la prezidanteco de G. Maertens (Belgio). La malnova Estraro kunsidis en Roterdamo en marto 1980. La malnova kaj la nova Estraroj kunvenis plurfoje dum la UK en Stokholmo. La nova Estraro kunsidis en Roterdamo en decembro 1980. Ekde tiu kunsido denove ĉeestas reprezentanto de TEJO.

(6) **Komisionoj kaj komisiitoj:** Okaze de la elektojar la Komitato kaj Estraro reviziis la tutan konsiston de la komisionoj kaj komisiitoj de UEA. Kompleta listo aperos en la Jarlibro 1981.

(7) **Revizoroj:** Estis reelektitaj T. Boersma kaj E.J. Woessink (Nederlando).

(8) **Laborplanoj:** La Estraro transprenis la komision pretigi strukturon por la 4a Baza Laborplano, laŭ kiu plulaboru la Komisiono pri Planado.

(9) **Landaj kaj Fakaj Asocioj:** La Asocio nun havas 43 landajn asociojn pro la aliĝo de Ĉina Esperanto-Ligo. Daŭre estas 3 aliĝintaj fakaj asocioj kaj 25 kunlaborantaj fakaj kaj neneŭtralaj asocioj.

3. ADMINISTRADO

(1) **Oficistoj:** La meza nombro de oficistoj kaj volontuloj salajrataj de la CO dum 1980 estis 9,4 (kompare kun 9,3 en 1979). En aŭgusto enposteniĝis Ole Hagemann (Danlando) kiu okupiĝas pri la aŭtomatigo de la oficejo. Pli frue, en julio, okazis redistribuo de taskoj pro la starigo de aliaj oficejoj. La antaŭa direktoro de la CO, d-ro Victor Sadler, fariĝis ĝenerala direktoro de la Asocio, por superrigardi la funkciadon

de ĉiuj oficejoj de UEA. Li krome superrigardas la perspektivan finanĉan planadon de la Asocio kaj la aŭtomatigon de la administrado en la CO. Ekde la 1-a de aŭgusto fariĝis direktoro de la CO Stefan MacGill, kiu venis al la oficejo el Nov-Zelando en 1976.

(2) Volontula Servo: La Libroservon funkciigis plentempaj volontuloj. Ĝis septembro 1980 deĵoris Probal Daŝgupto el Hinda Unio, poste Norman Henderson el Kanado. En decembro revenis antaŭa volontulo, Jacques Lindau el Francio, por deĵori kiel oficisto dum 4 monatoj. Komence de la jaro deĵoris volontule por TEJO kaj precipe por ĝia Komisiono pri Eksteraj Rilatoj Sylvaine Bourrelly el Francio. Ŝi revenis en junio kune kun Yves Bellefeuille (Kanado) por finpresti la raporton pri la strasburga seminario de TEJO. Post tiam ĝis la jarfino TEJO ne plu havis volontulon. R. Hirsch (FR Germanio) deĵoris dum 1980 pri la Delegita Reto, Societo Zamenhof kaj Fondaĵo Canuto. Jarfine la laboro pri la Delegita Reto kaj Societo Zamenhof estis reprenitaj al la CO, prepare al la aŭtomatigo de tiuj kampoj. Neformale volontulis en la CO dum mallonga tempo Berit Posthuma (Svedio) kaj Neven Kovačić (Jugoslavio).

(3) Domo: Duono de la bezonata riparo de la tegmento estis farita en 1980; la cetero estis prokrastita pro buĝetaj limigoj.

(4) Maŝinoj; Aŭtomatigo: La kompostilo en la CO spertis fundan riparon. Ĝis la jarfino, la Estraro definitive decidis aĉeti komputilon (PDP 11/23 DEC), presilon kaj tri ekranterminalojn por uzo en la CO. Ekde aŭgusto 1980, Ole Hagemann, kun d-ro Sadler kaj Fred de Geus (Nederlando), preparis la vojon por la instalota komputilo.

(5) Grafika Centro Antverpeno: La jaron karakterizis en GCA anstataŭigo de malnovaj brokantaj maŝinoj per modernaj kaj pli kapablaj. La Asocio aĉetis elektran tranĉmaŝinon, pli rapidan faldmaŝinon kaj rivelmaŝinon. Krome ĝi ricevis donace afrankomaŝinon kaj skribmaŝinon. Kvankam GCA varbis plurajn novajn klientojn, la ĉefaj restis la Centra Oficejo, eldonejo TK/Stafeto, Flandra Esperanto-Ligo kaj Belga Esperanto-Federacio. La sola salajrata oficisto estis Paul Peeraerts. Volontule laboris konstante Gerd Jacques, Jan de Craeye, Manuel Halvelik, Frank Maertens kaj Anne Tilmont, kaj dum parto de la jaro Ite Tytgat.

(6) Membraro: La lastaj ciferoj pri la asociaj membroj en 1980 estas 27 554, el kiuj 7 064 estas samtempe asociaj membroj de TEJO. (En 1979 temis pri 24 593 kaj 6 625.) Individuaj membroj sumiĝis jene: 1 133 MJ, 4 133 MA, 134 MJ-K, 221 MA-K, 987 DM (inkl. 27 DM-K) kaj 21 HM, t.e. entute 6 629 (en 1979: 6 278). Individuaj membroj de TEJO kreskis je 16% kompare kun 1979, kaj tiuj de la Asocio entute je 6%, por atingi la plej altan nombron de la lastaj jaroj. La sumo de ĉiuj membroj estas do 34 183 en 1980 (en 1979: 30 871), kaj tio estas rekordo en la tuta historio de UEA.

(7) Societo Zamenhof: Membriĝis por 1980 en tiu Societo 226 personoj, kiuj per tio signife subtenis la Asocion finance.



Tonkin kaj Setälä dum la akcepto por Societo Zamenhof en Stokholmo.

(8) Delegita Reto: Dum 1980 administris la Delegitan Reton nia komisiito R. Hirsch (FR Germanio), kunlabore kun la CO. Laŭ la Jarlibro 1981, ekzistas 1211 delegitoj, 189 vicdelegitoj, 63 junularaj delegitoj kaj 2109 fakdelegitoj. Tio kune sumiĝas al 3572 delegitaj funkcioj, kio pli-malpli egalas la tiurilatajn nombrojn por la antaŭa jaro.

(9) Jarlibro: En 1980 aperis 416-paĝa Jarlibro, la plej ampleksa en ses jaroj. Ĝi donis laŭlandan prezenton en novaj rubrikoj, kun praktikaj kaj turismaj informoj. Pluraj mapoj estis plibonigitaj kaj estis lanĉita la ebleco por lokaj grupoj prezenti sin per anonceto. Tion faris 27 lokaj grupoj en 1980. Parte pro tiu ampleksigo de la Jarlibro, ĝi aperis nur en julio, kaj ne kiel celate en aprilo. Kontentiga kvanto da pagitaj anoncoj (ĉ. 12 000 gld.) kontribuis al la kovro de tre altaj afrankokostoj por aera ekspedo. La redaktado de la Jarlibro transiris en septembro 1980 al Anna Brennan.

(10) Eldona agado: La longe atendata verko *Plena analiza gramatiko* de K. Kalocsay kaj G. Waringhien aperis en decembro 1980. La 600-paĝa, lukse bindita libro estis presita en 3 000 ekzempleroj en Ĉinio, kiel lasta etapo en kvinlanda kaj trikontinenta eldona maratono. Ĝis la fino de 1980 la Libroservo de UEA ricevis antaŭmendojn por 250 ekzempleroj. Du aliaj libroj estis dum 1980 kompostataj en Grafika Centro Antverpeno.

(11) Libroservo: La vendoj por 1980 atingis ĉ. 161 000 gld., kompare kun la rekorda sumo de 184 000 gld. en 1979. Aperis en julio, kaj estis dissendita kun la Jarlibro, la nova Katalogo de la Libroservo. Sur ĝiaj 304 paĝoj aperis priskriboj de pli ol du mil verkoj vendataj de la Libroservo, listoj de E-periodaĵoj kaj de aktivaj E-eldonejoj. La redaktan laboron faris la CO, dum la teknikan pretigon de la katalogo prizorgis GCA.

(12) Varbado: La CO sendis laŭmende al kotizperantoj kaj organizantoj de kongresoj varbilojn kaj specimenojn per kiuj varbi membrojn. Apartajn sukcesojn oni notis en Argentino, Brazilo, Hungario, Hispanio kaj Svedio. Pri *Kontakto* aperis afiŝoj, kiujn financis

TEJO mem; el la ĝenerala buĝeto venis jarfine nova varbilo/mendilo en 10 000 ekzempleroj.

(13) Kotizperantoj: En Finnlando retiriĝis la ĉefdelegito Harri Laine kaj transprenis la laboron Sirkka Salmivaara. En Svedio la landa asocio estas la kotizperanto, sed prizorgis la laboron ĝis 1980 Ester Andrén kaj nun transprenis ĝin Asta Schaedel. Islando unuafoje havas ĉefdelegiton, H. Sæmundsson. En Kolombio D. Hoyos Escobar transdonis la perantecon al L. Guillermo Restrepo. En Germana DR unuafoje oficis ĉefdelegito, J. Hamann.


(14) Poŝtmarkvendado: En 1980 la vendado de poŝtmarkoj liveris unuafoje pli ol 5 000 gld. Tio estas rekorda atingo, kaj spegulas la zorgan atenton de la komisiito Fred de Geus kaj liaj helpantoj. La komisiito pretas korespondi kun sendantoj de poŝtmarkoj, por konsili pri la plej vendeblaj specoj el difinitaj landoj, kaj li pretigis cirkulerojn tiucele.

4. FINANCO

(1) Spezokonto: Buĝetoj estas planoj aŭ prognozoj, kiujn en la praktiko ofte montriĝas maleble sekvi, precipe kiam temas pri organizaĵo socia kaj ne pri produkta entrepreno. Tio validis ankaŭ por UEA en la pasinta jaro. La spezokonto por 1980 (vidu la tabelon en la fino de la Raporto) montras, ke la Estraro "ne sekvis" la buĝetajn limojn ĉe la kostoj sed — feliĉe — ankaŭ ne ĉe la rimedoj. Tamen, la Estraro prezentas ankaŭ ĉi-foje pozitivan saldon, eĉ se temas nur pri kelkcento da guldenoj.

Okulfrapas, unuflanke, la granda plialtiĝo de la sendokostoj ĉe ĉiuj asociaj eldonaĵoj (*Esperanto*, *Jarlibro*, *Kontakto*). Tiuj ekspedokostoj — tra Londono — multe kreskis ne nur pro la altiĝo de la tarifoj sed ankaŭ pro la drasta plifortiĝo de la brita pundo dum la pasinta jaro. La kostoj kreskis ankaŭ pro la konsisto de la Estraro, t.e. pro la diverskontinenteco de la estraranoj.

EVOLUO DE LA KAPITALO KAJ FONDAĴOJ DE UEA: de 225 000 guldenoj en 1963 al 728 000 guldenoj en la fino de 1980.



Aliflanke, ĉe la rimedoj, la buĝetitaj sumoj estas grave superitaj ĉe la kotizoj kaj kongresaj enspezoj. Ankaŭ la rento plialtigis la rimedojn multe pli ol antaŭvidite. Tio okazis ne nur pro la aparte zorga administrado de la asociaj monrimedoj sed ankaŭ pro la fiksdaj deponoj de la membroj, pro iliaj ŝparkontoj ĉe UEA. Per kvin mil guldenoj kontribuis ankaŭ la vendado de la uzitaj poŝtmarkoj. Negativa surprizo ĉe la rimedoj estas la malkresko de la libroservaj vendoj. Fakte, ne temas pri ia ĝenerala malkresko sur tiu kampo sed pri du aliaj faktoroj: UEA ne organizis la kongresan libro-servon en 1980 kaj *Plena analiza gramatiko* ne aperis tiel frue kiel la buĝeto antaŭvidis.

(2) Bilanco: La bilanco de UEA fine de 1980 tre klare spegulas la pasintjaran aktivecon. Ĉiu ero tie (vidu la tabelon en la fino de la Raporto) rakontas pri klopodoj, kreskoj kaj evoluoj. La ĝeneralaj trajtoj de la bilanco estas konsiderinda kresko de la monrimedoj kompare kun 1979 (pluso de preskaŭ 37 000 guldenoj) kaj stabiliĝo de la valoro de obligacioj kaj akcioj. Grave estas, ke la Asocio povis disponigi al Instituto Hodler '68 prunton (je favora interezo) de 112 000 guldenoj, por la aĉeto de domo en Antverpeno. En tiun domon baldaŭ translokiĝos la Grafika Centro de UEA. Krome, pli ol 23 000 guldenoj iris al la modernigo de la ekipaĵoj en la oficejoj de Antverpeno kaj Nov-Jorko. Ĉio ĉi eblis dank' al la fiksdaj deponoj de la membroj (pli ol 63 000 gld., plejparte en 1980), kresko de la totala sumo de la fondaĵoj (pluso de pli ol 28 000 gld.) kaj rekorda nivelo de la asocia kapitalo — nun pli ol duona miliono da guldenoj, kun kresko de preskaŭ 50 000 kompare kun la antaŭa jaro.

(3) Konkludo: Kvankam la financa situacio povus ŝajni maksimume sekura, en nia kazo ĝi ĉiujare denove dependas, tre esence, de la libervolaj kontribuoj de la membraro (pli ol 120 000 gld. en 1980). Se dum unu sola jaro la Asocio ricevas nur la kotizojn kaj kelkajn relative konstantajn enspezojn (libroservaj vendoj, rento, anoncoj), se samtempe ne alvenus la kotizoj por la Societo Zamenhof, la donacoj kaj testamentoj, se fiaskus la vendado de poŝtmarkoj, se ne ekzistus la fiksdaj mondeponoj, tiam la financa situacio de UEA rapide fariĝus senespera. Malgraŭ la fakto, ke kelkaj niaj servoj havas iasence komercan aspekton, ni ne rajtas forgesi, ke la cetero, ke la plimulto de la asocia laboro ne havas tiun komercan bazon sed — tute male — esence dependas de la mecenata sinteno de la membraro de UEA. Kiel montras la tuta historio de la Asocio, ni povas — feliĉe — ankaŭ estonte kalkuli pri la grandanima subteno de nia membraro.

5. INSTITUCIO HODLER '68

(1) Estraro kaj administranto: La ĝistiamaj prezidanto, Grégoire Maertens, retiriĝis el la estraro pro okupiteco. La Estraro de UEA nomis d-ran Renato Corsetti kiel novan estraranon ekde la 20a de decembro 1980. Administranto restis V. Sadler.

(2) **Subvencioj:** El la rento de 1979 la estraro disdividis 14 000 gld. en subvenciojn al: Fondaĵo Azio-Afriko (1500), S. Chakravarty (Hinda Unio, 500), Fondaĵo Canuto (3 000), Nov-Jorka Oficejo de UEA (2 000), Eŭropa Esperanto-Centro (1 000), Urba Biblioteko de Kortrijk (Belgio, 500), Komisiono pri Sciencaj kaj Fakaj Aplikadoj de Esperanto ĉe HEA (Hungario, 1 000), C. Darbellay (FRGermanio, 1 000 por kolektado de informoj pri esperantistoj-sciencistoj), Ornitologia Rondo Esperantlingva (250), Nederlanda Esperanto-Centro (1 000 por vortaro), Eldona Fondaĵo de UEA (1 000 por lernolibro), Sarmlanda Esperanto-Ligo (750 por romano), Hungara Esperanto-Asocio (250 por poezia antologio), eldonejo Edistudio (250 por poemaro). Entute en 10 jaroj Instituto Hodler disdonis 87 550 gld.

(3) **Investoj:** En la 5a de decembro 1980 la Instituto aĉetis kvaretaĝan domon en unu el la ĉefaj avenuoj de Antverpeno. Post riparoj kaj plibeligo ĝi estos ludonita kaj servos kiel konstanta laborejo de la Grafika Centro de UEA kaj kunveno de la antverpena grupo "La Verda Stelo", kiu kunlaboris en la aĉeto kaj riparado.

6. REVUO

(1) **Redaktoro:** Simo Milojević. Konstantajn rubrikojn prizorgis: B. Golden (Ekzameno E), I. Jackson (TEJO-paĝo) kaj G. Larglantier (Esperanto en radio).

(2) **Amplekso kaj enhavo:** La jarkolekto 73 (1980) ampleksis 220 paĝojn. Kontribuis ĉ. 80 aŭtoroj, inter kiuj pluraj unuafoje. Tra la jaro, la revuo klopodis speguli la agadon tiel de la Esperanto-movado ĝenerale kiel de UEA mem. Apartan atenton ricevis la landaj movadoj en Hinda Unio, Kubo, Brazilo, Irano, Japanio, Pollando kaj kelkaj evolulandoj. Atento dediĉiĝis al la kongresaj landoj: Svedio, Finnlando kaj Brazilo. Kelkaj lingvistikaj kaj esperantologiaj demandoj amplekse prezentiĝis. Plurfoje la atento iris al la faka agado, virina aktiveco kaj kelkaj entreprenoj de TEJO. La revuo detale antaŭprezentis la kongresan temon de la Kongreso en Stokholmo, kiu okupis ankaŭ la tutan septembran numeron. Simile, la eksteraj rilatoj de UEA estis plurfoje prezentitaj, aparte en la raportoj pri la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Beogrado. El la asociaj demandoj la revuo detale skribis pri la planoj por la aŭtomatigo de la administrado. Festan karakteron havis la numero de junio, por omaĝi la 75-jaran datrevenon de la ekapero de ĉi tiu revuo en 1905. Pluraj kontribuoj traktis diversajn lingvajn demandojn. Regule aperis la konstantaj rubrikoj, kiel ekz. "Recenzoj" en kiu prezentiĝis 62 novaj libroj. Spacon ricevis kelkaj beletraĵoj kaj la kultura agado de UEA. Ĝenerale, la revuo celis teni la nivelon de la entuziasmo pri la Internacia Lingvo kaj provizi al la legantoj fidindajn kaj ĝisdatajn informojn por ilia propra Esperanto-agado.

(3) **Teknika prizorgo:** La teknikan redaktadon, kompostlaborojn kaj la fotadon faris la CO en Roterdamo (parte ankaŭ la Grafika Centro en Antverpeno).

(4) **Abonantaro, eldonkvanto, anoncoj:** La suma nombro de la abonantoj en 1980 estis 8 084, kio estas je kelkaj centoj pli ol en la antaŭa jaro. La eldonkvanto variis inter 8 500 kaj 10 200 ekzempleroj. Anoncoj enspezigis la sumon de 13 700 guldenoj, kio estas 5 000 malpli ol en 1979, ĉefe pro la manko de ekstermovadaj anoncoj.

(5) **Ekspedo:** La meza aperdato en Nederlando estis la 25a de la koncerna monato. La malfruon ĉefe kaŭzis diversaj nerevuaj taskoj de la redaktoro, kio nun estas survoje al la solvo. La revuo ekspediĝis tra Londono, kio ankoraŭ ŝparas konsiderindan sumon. Tamen, la CO notis multnombrajn plendojn pri la malrapideco de tiu vojo kaj ĝi nun reekzamenas la tutan demandon pri la ekspedvojoj.

7. KONGRESOJ

La 65a UK en Stokholmo (kiu estis iom jubilea, ĉar okazanta 75 jarojn post la Unua UK en Bulonjo-sur-Mar) estis granda kongreso, tiel laŭ la nombro de aliĝintoj (1800 el 52 landoj), kiel laŭ la nombro de programeroj. Efektive, tiom plenega programo elmontras, unuflanke, la grandiozan variecon en niaj kongresoj, sed, aliflanke, atentigas, ke oni devos nun akcepti limojn kaj ne enmeti pli da programeroj.

Ĉu sekve rezigni pri kelkaj karaj tradicioj, por povi krei novajn, jen nur unu el la demandoj, kiuj devos



Flugu kun UEA al la 66a UK en Brazilio!

Se vi ankoraŭ ne aliĝis al la ĉi-jara Kongreso en Brazilio, petu kaj legu ĉi tiujn prospektojn pri la flugprogramoj de UEA! Prezoj de 3974 ĝis 5998 gld. Diversaj datoj, ekirpunktoj kaj flugvojoj, inkluzive de kvinlanda rondvojaĝo tra la sudamerika kontinento. Se vi rapidos, eblas ankoraŭ aliĝi pere de la Centra Oficejo de UEA.

okupi la kongresajn respondeculojn, en la Estraro same kiel en la komisiono kaj la Centra Oficejo. Nova kongresa regularo, post la nova Statuto kaj reviziota Ĝenerala Regularo, estas en preparo.

La ĉi-jaraj elektoj de komitatanoj B kaj C kaj estraranoj okazis laŭ la nova Statuto. La elektokomisiono dum la du antaŭaj jaroj intense laboris kaj, sekve, la elektoj povis okazi komence de la Kongreso, sendrame. Pri la ĉeftemo de la UK "Diskriminacio" oni okupiĝis dum ĉ. 30 horoj en du ĝeneralaj kunvenoj, diversaj prelegoj, seminarioj kaj konversaciaj rondoj por nespartaj parolantoj. Ĝi elvokis grandan interesiĝon ankaŭ en la ekstermovadaj rondoj.

En la kadro de ISU (kiu ekde 1981 ŝanĝis sian nomon al "Internacia Kongresa Universitato" – IKU) okazis kiel pasintjare 11 prelegoj; krome, la esperantologia konferenco enhavis kvar prelegojn.

La artaj aranĝoj estis multnombraj: teatra vespero, prezento de premiita dramo dum la aranĝo de la Belartaj Konkursoj, arta vespero kaj ses aliaj koncertoj, pupteatro. Dum la semajno ekestis kaj ekzercadis Internacia Kanthoro, kiu prezentigis per siaj kantoj dum la ferma solenaĵo. En la riĉa libroservo la kongresanoj montris ne nur interesiĝon sed ankaŭ aĉetemon.

Okazis trideko da fakaj kunsidoj, progresiga kurso, Cseh-seminario, du ekspozicioj. Unuafoje estis en la programo aŭkcia vendo de raraj esperantaĵoj (favore al la Fondaĵo Azio-Afriko). La aranĝo montriĝis gaja, utila kaj ripetinda.

La gazetara servo funkciis aparte bone rilate la neesperantistan publikon. Oni antaŭvidas eldoni la kongresajn rezoluciojn en la nacilingvaj serioj de *Esperanto-dokumentoj*.

La 18an Internacian Infanan Kongreseton partoprenis 28 infanoj el 13 landoj. Ĝi okazis en speciale taŭga loko ekster la grandurbo, kaj la junaj kongresanoj vere estis kontentaj.

Estontaj Universalaj Kongresoj okazos en Brazilio (1981) kaj Antverpeno (1982). Dum la jaro la Estraro daŭrigis la traktadon pri la kongresaj urboj por la jaroj 1983-1985.

8. INFORMADO

(1) Enkonduko: En la nuna stadio de la disvastigiteco de la Internacia Lingvo la informado estas, kaj devas ankoraŭ longe resti, ĉefa kaj unu el la plej esencaj laborkampoj de la Esperanto-movado. Ĝi estas tiu tereno sur kiu ekzistas plenumenda laboro por ĉiuj, de unuopaj esperantistoj kaj lokaj grupoj, ĝis la landaj kaj fakaj organizaĵoj, ĝis la tutmonda asocio kiel UEA. Aliflanke, ĝuste sur ĉi tiu kampo estas aparte malfacile difini kiu devas plenumi kiun informan taskon. Tial okazas, ke UEA ofte okupiĝas pri unuopaj informpetoj, precipe kiam ili venas el landoj sen organizita Esperanto-movado, kaj ke lokaj aŭ landaj organizaĵoj faras internacian informlaboron. Estas nenio malbona en ĉi tia praktiko, kondiĉe ke la tuto estu bone kun-

ordigita. Prave oni atendus, ke la informa rolo de UEA estu ĝuste tiu kunordigado.

(2) Komisiono pri Informado: Ankaŭ ĝi, kiel ĉiuj organoj de UEA, havas novan konsiston post la 65a UK. Ĝi kunvenis kaj korespondis sufiĉe intense post Stokholmo. Interalie, la Komisiono esploris eblecojn utiligi teletajpilojn en la distribuado de la novaĵoj. Montriĝis, ke tio nuntempe ne estas ekonomia, ke ĝi estus tro multekosta por UEA. La Komisiono ellaboris liston de gravaj internaciaj konferencoj en kiuj UEA klopodos reprezentiĝi dum 1981. Estis diskutitaj ankaŭ ideoj pri eldono de internacie uzeblaj informiloj, ekz. afiŝoj, kiuj preskaŭ plene mankas en la merkato. La malnovaj planoj fari el la Grafika Centro en Antverpeno la ĉefan movadan informojon ne progresis kaj ne havas grandajn ŝancojn baldaŭ realiĝi. La iam bone konata kaj nun preskaŭ forgesita seslingva faldfolio de UEA ankoraŭ atendas sian reeldonon.

(3) Landaj informaj fakoj: La fakto, ke la Movado bone fartas kaj progresas en difinita lando klare montras, ke la informa laboro tie estas altnivela. Unualoke oni devus ĉi tie mencii Hungarion kaj Japanion, kie regule aperas nacilingvaj periodaĵoj pri Esperanto. Pro la sukceso de la tieaj korespondaj Esperanto-kursoj trudiĝas konstato, ke ankaŭ en Pollando la informa laboro estas bona. Simile estas ankaŭ en Bulgario, Germana DR, kaj parte en Brazilo, Soveta Unio, Kanado, Jugoslavio kaj Ĉinio. La multnombreco de la kursanoj en Irano, Rumanio, Kubo kaj Korea Respubliko atestas la kvaliton de la informa laboro en tiuj landoj. En landoj kiel Britio, Italio, Francio kaj Belgio, la informa laboro direktiĝas unuavice al la parlamentanoj kaj la resto de la politika elito de la koncernaj socioj. Ĉio ĉi ne estas rezulto de ia senĉesa instigado fare de UEA al la landaj informaj fakoj. Plurloke la instigado ne plu necesas, ĉar temas pri movade plenkreskaj unuopuloj aŭ organizaĵoj. Necesas eble pensi, ke en ĉi tiu kampo la tradicia rolo de UEA devus ŝanĝiĝi. Oni ne plu sopiras ricevadi instigajn ŝablonajn cirkulerojn de UEA sed gravajn kaj mankantajn verkojn sur kiuj devas baziĝi ĉia serioza informa laboro. Sonas almenaŭ surprize aserti, ke la ĉefaj kontribuoj de UEA al la informa laboro dum la lastaj jaroj estis la eldono de ekz. *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto de Wells* kaj *Esperanto: Ĉu eŭropa aŭ azia lingvo?* de Piron. Ne montriĝis necese instigadi, ke oni traduku tiujn studojn nacilingven, tio de si mem okazis kaj okazas.

(4) Informa laboro de la CO: *Internacia gazetara servo* (IGS) produktis nur kelkajn novaĵbultenojn dum 1980. Ne mankis novaĵoj sed homaj fortoj kaj — iom — financaj rimedoj. Venis multaj unuopaj informpetoj, precipe el Afriko kaj Hinda Unio. Unuafoje eblis dum la pasinta jaro reagi al tiuj petoj almenaŭ parte en unu el la lokaj lingvoj de la koncerna mondparto dank'al la ekzisto de broŝuroj en la svahila kaj hindia lingvoj. Kiel konate, la tuta laboro de la Nov-Jorka Oficejo de UEA konsistas el la informa laboro, kion traktas la ĉapitro pri la eksteraj rilatoj.

Gravan rolon en la informa laboro ludis dum la antaŭaj jaroj *Esperanto-dokumentoj*, sed en 1980 ilia eldono stagnis. En kelkaj landoj oni prave komencis konsideri ĉiun numeron de la revuo *Esperanto* kiel monatan novaĵleteron, por traduki el ĝi kaj aperigi en nacilingva gazetararo.

(5) Kongresa informado: La eĥo de la 65a UK en Stokholmo en la nacilingvaj amaskomunikiloj estis aparte bona, unuavice en Svedio mem sed ankaŭ en pluraj aliaj landoj. En Stokholmo ne funkciis la Esperanta branĉo de la Kongresa Gazetara Servo, kion oni de pluraj flankoj forte kritikis. Tamen, se niaj fortoj estas limigitaj kaj se ni devas elekti kio bone funkciu dum la kongresoj, la Esperanta aŭ la nacilingva informado, ni voĉdonos por la atento al la ekstermovadaj informiloj. Stokholmo multilate povas servi kiel ekzemplo en ĉi tiu tereno.

(6) Internaciaj organizaĵoj kaj kunvenoj: Ankaŭ en la pasinta jaro UEA atente zorgis pri ĉi tiu aspekto de la informa laboro. Fakte, la tuta labortereno de la eksteraj rilatoj de UEA estas unuavice informa. Tion amplekse traktas la ĉapitro 9, kie menciigas ankaŭ kelkaj landaj kontribuoj al la internaciskala informado.

(7) Prelegvojaĝoj: Ni ne havas plenan superrigardon pri ĉi tiu informa branĉo, sed ŝajnas ke 1980 ne portis malpli bonan rikolton ol kelkaj antaŭaj jaroj. Krome, iam Svedio estis la ĉefa celo de la movadaj prelegvojaĝoj, dum en 1980 tio ŝajnis fariĝi Japanio. Prelegvojaĝis interalie: H. Kindler, C. Nourmont, T. Tyblewski, S. MacGill, A. Goodheir, V. Benczik, C. Piron, M. Boulton kaj R. Corsetti. Ankoraŭ mankas internacia kunordiganto de ĉi tiu agadformo.

(8) Radio kaj televido: Pli ol 3200 regulaj radio-programoj okazis en Esperanto dum 1980. Oni malfacile povas paroli pri ili kiel formo de la informa laboro, kvankam ilia informa efiko estas grava. Neniu statistikis internacie la radio-elsendojn pri Esperanto. Same pri la televido. Oni tamen povas noti, ke en kelkaj landoj (Francio, Italio, Jugoslavio, Finnlando, Japanio, Pollando, Svislando, Brazilo) la Internacia Lingvo ne estis malofta temo de televidaj programoj.

(9) Konkludo: Kiel ajn teoria kaj nekonkreta ŝajnas la kampo de la informado, ĝuste de ĝi oni atendas konkretajn kaj nombreblajn rezultojn. Oni povas dubi pri nia laŭda juĝo de la kongresa informa laboro en Stokholmo, sed oni ne rajtas subtaksi la fakton, ke tiu 'ne konkreta' laboro rezultigis plurajn centojn da konkretaj informpetoj pri Esperanto. Tamen, pri kelkaj aspektoj de la informa laboro ja necesas rezigni pri teorumado kaj simple produkti finfine kelkajn bazajn helpilojn, kiel ekzemple tiun seslingvan faldfolion kaj internacie uzeblan afiŝon. Fine, la informa laboro en 1980 estis bona, sed ni ne kontentu pri ĝi, ĉar ni povas agi pli bone kaj pli organizite sur ĉi tiu laborkampo.

9. EKSTERAJ RILATOJ

(1) Unuiĝintaj Nacioj: En speciala kunveno la 13an de decembro 1980, la kunlaborantoj de la Nov-Jorka Oficejo de UEA festis la Zamenhofan Tagon kaj la unuan jaron de la Oficejo. Partoprenis la aranĝon reprezentanto de la Pola Misio ĉe UN. La ekzisto de la Oficejo multe fortigis la influon de UEA ĉe UN, tiel ke ĝi nun rekte kontaktas la diversajn landajn misiojn pri aferoj reciproke interesaj, kiel ekzemple la funkciado de la lingvaj servoj ĉe UN kaj la agado de UEA en la kadro de la Ekonomia kaj Socia Konsilio (Ekosok). Plia dokumento de UN aperis en Esperanto. En julio, la Fakto de UN pri Publika Informado aperigis en broŝura formo Esperantan tradukon de la Ĉarto de UN kaj la Statuto de la Internacia Kortumo. Temas pri reviziita eldono de la iama samenhava broŝuro eldonita de UEA. Aperis ankaŭ represo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Esperanto kaj UEA menciigas de tempo al tempo en la interna periodaĵo de la UN-sidejo *Secretariat News* kaj formis temon de pluraj gazetartikoloj, interalie, en *Newsweek* kaj *The New York Times*.

La laboron de ĉi tiu filio de UEA subtenas la societo de Amikoj de la Nov-Jorka Oficejo, kiuj tre malavare kontribuis al tiu agado en 1980. Ĝis nun tiuj Amikoj plejparte estas el Kanado kaj Usono, sed necesas plivastigi la reton. Aparte grandaj kontribuadoj estis lastatempe ricevataj de Institucio Hodler '68, de Oomoto (Japanio) kaj de malnova subtenanto de la UN-agado, s-ino Dorothy Henderson (Kanado). Por la Amikoj kaj por la funkciuloj ktp. de UN, kun kiuj UEA tenas kontakton, la Oficejo eldonas anglalingvan novaĵleteron.

UEA estas reprezentata en ĉiuj plej gravaj konferencoj ktp. de UN en Nov-Jorko, kaj, pere de siaj reprezentantoj en Ĝenevo (Claude Piron) kaj Vieno (H-M).



Emmanuel Chicot (dekstre), kiu reprezentas UEA ĉe Unesko, salutas ties ĝeneralan direktoron dum akcepto en marto 1981

Maitzen) ankaŭ en tiuj urboj. UEA reprezentigis inter la invititaj neregistaraj organizaĵoj dum la Virina Konferenco de UN en Kopenhago, en julio 1980. Regule aperadas la esperantlingva bulteno *UN kaj ni*, kiu publikigas interesajn informojn pri la laboro de UN kaj ĝiaj instancoj, sub la redakto de Akiko Woessink-Nagata. La nederlanda filio de UNICEF, porinfana fako de Unuiĝintaj Nacioj, denove eldonis por UEA serion de salutkartoj por la Nova Jaro kaj Semajno de Internacia Amikeco.

(2) Unesko: UEA daŭre membras en la estraro de la Konferenco de Neregistaraj Organizaĵoj (NROj) en Konsultaj Rilatoj kun Unesko. Ĝi estas gvidanto de la Laborgrupo pri Problemoj de Komunikado, kiun starigis la Konferenco je instigo de UEA, post ties sukcesa kolokvo pri la rajto je komunikado antaŭ unu jaro. Aktive partoprenis la agadon de la Laborgrupo dudeko da NROj. Kunordigas Emmanuel Chicot, reprezentanto de UEA.

La Asocio estas regule reprezentata en kunvenoj de Unesko, kiuj iel tuŝas ĝian laboron, kaj UEA ofte intervenas pere de siaj reprezentantoj. En la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Beogrado, Tibor Sekelj reprezentis UEA kaj faris amason da utilaj kontaktoj kun la delegitoj (v. *Esperanto*, nov. kaj dec. 1980). Personaj kontaktoj estis restarigitaj kun la Ĝenerala Direktoro de Unesko, okaze de lia reelektiĝo.

Aparte grava atingo estis prelego de la tiama prezidanto de UEA, d-ro Tonkin, antaŭ la stabanoj de la Fakoj pri Konferencaj Servoj de Unesko, en aprilo 1980. Tiu prelego, farita laŭ invito de la estro de la Fakoj (kiu prizorgas i.a. la lingvajn servojn), estis tiel sukcesa, ke d-ro Tonkin estis invitita denove prelegi kaj faris tion en decembro. La unuaj paŝoj por starigo de Esperanto-kurso en la sidejo de Unesko en Parizo estas ankaŭ faritaj.

(3) Regionaj Organizaĵoj: La oficialaj kontaktoj inter UEA kaj la Organizo de Amerikaj Ŝtatoj daŭris dum la jaro. Lastatempe UEA decidiĝis peti oficialajn rilatojn ankaŭ kun la Konsilio de Eŭropo en Strasburgo.

Eŭropa Esperanto-Centro (EEC) daŭrigis sian aktivecon en Bruselo kaj povis noti kuraĝigan evoluon rilate la sintenon al la lingva problemo en Eŭropa Komunumo. Pro la daŭra alsendado, plej ofte en formo de leteroj, de ĉiaspecaj informaj materialoj kaj pro pli oftaj personaj kontaktoj kun multaj deputitoj de la Eŭropa Parlamento, ties komisiono pri junularaj, kulturaj, edukaj, informaj kaj sportaj demandoj proponis (pere de la t.n. Raporto Patterson; dokumento n-ro PE 64563) starigon de laborgrupo, kiu pritraktu i.a. la eblecojn de la internacia lingvo. La plej grava atingiĝo ĉi-rilate estas la fakto, ke la parlamentanoj mem iniciatis la enketon pri Esperanto, sen rekta interveno de esperantisto aŭ movada instanco. En septembro 1980 la Parlamento akceptis la proponon de tiu komisiono, kaj nun la laborgrupo formiĝas.

La agado de EEC endanĝerigis fine de la jaro pro la manko de financa subteno fare de la naŭ landaj aso-

cioj, kiuj kunfondis Eŭropan Esperanto-Union. Kvan-kam ses landaj E-organizaĵoj dekomence promesis fincan subtenon, montriĝis ke nur la belga, franca kaj germana iom regule kontribuas, kion faras ankaŭ Luksemburgo, kiu ne faris tiun promeson. Britio, Italio kaj Nederlando ne plenumis siajn promesojn ĉi-rilate. Fakte, la ekziston de la oficejo de EEC en Bruselo oni devas unuavice danki al la financa subteno de UEA kaj de Instituto Hodler '68.

(4) Interŝtataj fakaj organizaĵoj: Dum sia kongreso en Manilo, en septembro/oktobro 1980, la Organizo Monda por Turismo akceptis tre gravan t.n. Deklaracion de Manilo pri la organizado de la internacia turismo. Dank' al la efika laboro, precipe de la hungara delegacio, la Deklaracio inkluzivas aludon al la aparta valoro de la scipovo de lingvoj, "precipe de tiuj kun universala destino, kiel Esperanto...". UEA faras specialajn klopodojn por atentigi la diverslandajn turismajn instancojn pri tiu parto de la Deklaracio kaj por ekspluati ĝin ĝis maksimumo rilate la enkondukon de Esperanto en la turismon. (*Esperanto*, jan. 1981).

(5) Neregistaraj Organizaĵoj: Pluraj novaj kaj gravaj iniciatoj okazis esence ekster la kadro de UEA, kvankam kun ties principa subteno. Eble la plej grava estis la utiligo de Esperanto en la 9a Internacia Kongreso de Kibernetiko (Belgio, septembro 1980). En la kadro de tiu kongreso okazis la 3a Internacia Konferenco pri la Lingva Problemo en la Scienco, en kiu vaste rolis esperantistaj parolantoj. Tiel forta estis la efiko de la utiligo de Esperanto en la Kongreso, ke oni transiros de ĝia eksperimenta uzo kaj ĝi fariĝos oficiala laborlingvo ekde la venonta kongreso.

Ankaŭ aparte interesa estis la okazigo de seminario de Japana Esperanto-Instituto pri lingvaj problemoj en nova internacia ordo, en la kadro de la Monda Kongreso de Mondfederistoj kaj Asembleo de Mondcivitanoj en Japanio. En la Pupteatra Internacia Festivalo (Jugoslavio, okt. 1980) Esperanto denove rolis tre signife. La plimulto de la prezentaĵoj okazis en Esperanto; la 9a internacia renkontiĝo de lernantoj de Esperanto okazis ankaŭ en la kadro de tiu ĉi internacie rekonata teatra aranĝo.

Kiel kutime, UEA reprezentigis en renkontiĝoj de pluraj internaciaj neregistaraj organizaĵoj (NROj), i.a. en la Monda Forumo de Internaciaj Asocioj (Bruselo, junio), kaj ĝi gastigis plurajn reprezentantojn de NROj en la propra kongreso. Daŭris ankaŭ la amikaj kontaktoj kun aro da NROj, ĉu pere de iliaj sidejoj, ĉu pere de iliaj reprezentantoj ĉe UN kaj Unesko.

(6) Landa Ekstera Agado: En Britio, la Esperanta Parlamenta Grupo nun konsistas el 116 parlamentanoj — frukto de daŭra kresko tra la lastaj jaroj. En Francio, senatano Francis Palmero prezentis novan leĝproponon, laŭ kiu Esperanto fariĝu nedeviga lernobjekto en la mezlernejoj kaj supera edukado, kaj kursoj por instruistoj estu starigitaj. En pluraj aliaj landoj daŭris aŭ starigis parlamenta agado. Daŭras ankaŭ kontaktoj kun naciaj asocioj pri Unuiĝintaj

Nacioj. En pluraj lokoj oni faras apartajn klopodojn starigi sur scienca bazo dialogon kun naciaj sciencaj kaj similaj instancoj. Menciindaj estas uŝonaj iniciatoj tiurilataj kaj la daŭra scienca laboro en Germana DR, Rumanio kaj Pollando. En Jugoslavio okazis tute interesa iniciato: organizo en tri lokoj de Maltaĵ Kulturaj Tagoj, per kunlaboro kun maltaĵ esperantistoj.

10. KULTURO KAJ EDUKADO

(1) Kulturo: Sur la kampo de kulturo estas aparte konstatebla lanĉo de diskutado pri kulturpolitiko de UEA, kiun iniciatis ĝia estrarano pri kulturo malfrue en la jaro per ampleksa cirkulero, sendita al ĉiuj komitatanoj, aliĝintaj landaj asocioj kaj pluraj artistoj, eldonistoj kaj aliaj kulturagantoj en la Movado. Reagoj daŭre alvenas en formo de detalaj komentoj kaj novaj ideoj. La rezultoj de tiu entrepreno estos prezentitaj en iu venonta numero de la revuo en tiu ĉi jaro.

Unuopaj ideoj, klare subtenataj de ĉiuj reagintoj kaj de la Estraro estas jam en stadio de plia ellaboro. El tiuj estas aparte menciinda instigo al la landaj asocioj starigi proprajn komisionojn pri kulturo, kiuj povus okupi sin pri pliintensigo de Esperanta kulturagado en la koncerna lando, pri rimedoj diskonigi naciajn kulturvalorojn per Esperanto, same kiel pri diskutado kaj planado de kulturaj aferoj en la internacia Esperantomovado, en kunlaboro kun UEA.

En la jaro 1980, la Belartaj Konkursoj havis sian tri-dekan datrevenon. Dum tiuj 30 jaroj la nombro de la konkursaĵoj atingis ĝis 2400. En 1980 konkursis entute 106 verkoj, ĉiuj originalaj. Aparte rimarkinda estis bela sukceso de eksterordinara branĉo, la romano, por okaza premio, omaĝe al la Esperanto-verkisto Raymond Schwartz. La relative altnombra partopreno en tiu konkurso (10 manuskriptoj) pruvas, ke inter ni ja troviĝas verkistoj sufiĉe seriozaj kaj dediĉemaj por entrepreni literaturajn faregojn, kiam sufiĉe instigas tion la cirkonstancoj. Ĉi tiun gravan premion gajnis Éva Tófalvi (Hungario) kaj Oldřich Kníchal (Ĉeĥoslovakio) pro sia komuna verko *Kiuj semas plorante*.

Rimarkinda estas ankaŭ la kresko de intereso pri tradukkonkursoj sub aŭspicio de UEA. En Stokholmo, rezultoj de kvar tiaj estis raportitaj: finna, franca, germana kaj itala. Pliaj estas en preparo aŭ jam okazis (bulgara, kataluna, nederlanda, pola).

La Internacia Somera Universitato (nun: Internacia Kongresa Universitato) prezentis indan faskon da prelegoj en 1980 pri diversaj aspektoj de diskriminacio, pri literaturo kaj naturscienco.

Sur la kampo de eldonado estas aparte menciindaj novaj volumoj en la unika kaj ekstreme valora serio de la plena verkaro de Zamenhof, eldonata de Ludovikito, Japanio: *Klopodis organizi, sed vane!* kaj *Por kaj kontraŭ reformoj!* Alia verko el Japanio elstare atentinda pro la gravege serioza temo kaj belzorga aspekto, estas la libreto *Hiroŝima-Nagasaki: Bilda dokumento pri la atombombado*. en kies senpaga dis-

tribuo UEA kunlaboris. La mejloŝtona verkego de Kalocsay kaj Waringhien, *Plena analiza gramatiko de Esperanto*, faris sian longe atenditan aperon fine de la jaro. Beletra evento estis eldono de teatraĵo de Shakespeare, *Rikardo tria*, en traduko de John Francis.

Nova beletra revuo, *Fonto*, estis lanĉita en la jaro, eldonata en Brazilo sub redaktoreco de William Auld.

(2) Edukado: Jam ekde 1978 okazadis esploroj koncerne instrumaterialajn projektojn kaj instruprogramojn ĉe la Pedagogia Komisiono de Pola Esperanto-Asocio en kunlaboro kun UEA. Tiuj esploroj ankoraŭ atendas sian finon, eventuale sub refortigita instigo de UEA. Aparta esploro estas en progreso ĉe UEA pri efektivegeblo de eldono de kajeroj taŭgaj por junaj gelernantoj de Esperanto en lernejoj kaj kursoj, kaj ankaŭ pri proponoj por novaj internaciaj ekzamenoj. Sur la kampo de lerneja instruado estas menciindaj novaj iniciatoj de Esperanto-instruaj organizaĵoj en Hungario, Italio kaj Jugoslavio, kies reprezentantoj kunvenis en Maribor, Jugoslavio, en aprilo por ekzameni i.a. efikojn de lernejaj eksperimentoj en tiuj landoj. Estis konstatite, ke la disponiĝo de instrukapablaj esperantistoj postrestis la plifavoriĝon de la etoso kaj juraj cirkonstancoj de lerneja Esperanto-instruado. Trejnado de pli da kapablaj instruistoj de la lingvo do estas urĝa.

11. JUNULARA SEKCIO

(Tutmonda Esperantista Junulara Organizo)

(1) Enkonduko: En 1980, TEJO realigis plurajn iniciatojn, kiuj fontis el la antaŭa laborperiodo kaj el diskutoj en ĝia Komitato. La jaron karakterizas plifirmiĝo de la eksteraj rilatoj, kresko de la individua membraro, plivastiĝo de la Pasporta Servo, pli efika kunlaboro kun la Esperanto-junularo de Latin-Ameriko kaj orienta Azio, sukcesa kongreso kun aparte bonaj financaj rezultoj.

(2) Komitato: En 1980 la Komitaton de TEJO konsistigis 53 gejunuloj. Ĝi kunsidis dum la 36a Internacia Junulara Kongreso (IJK), en Rauma (Finnlando). Kvin komisionoj pri specifaj taskoj funkciis ankaŭ ekster la komitatkunsidoj kaj IJK.

(3) Estraro: La Estraro elektita en 1979 eniris sian duan jaron, sed pro profesiaj kialoj en julio 1980 demisiis Stefan MacGill (prezidanto) kaj Zdravka Metz (estraranino). Csaba Lendvay (Hungario) fariĝis la nova prezidanto, dum noveniris la Estraron Marianne Böckmann (Belgio) kaj Tomasz Jan Kudrewicz (Pollando). La Estraro kunsidis en majo en Budapeŝto, dum la IJK en Rauma kaj jarfine en Kassel (FR Germanio). Krome, okazis pluraj neformalaj kunvenoj de estraranoj.

(4) Membraro: Dum la jaro 1980, la individua membraro de TEJO kreskis de 322 al 382. Plej multajn novajn membrojn TEJO gajnis en Latin-Ameriko. Daŭre validas la oferto por la gejunuloj malpli ol 18-jaraj, kiuj povas unuafoje membriĝi en TEJO/UEA

por du jaroj pagante la kotizon nur por unu jaro. Tiun oferton en 1980 eluzis 37 junaj homoj, tiel ke la membraro en tiu aĝgrupo preskaŭ duobligis inter 1979 kaj 1980. Aliĝis novaj landaj sekcioj en Flandrio kaj Slovakio, sed malfondiĝis la belga, nov-zelanda kaj svisa sekcioj. Fine de la jaro TEJO havis 7064 asociajn membrojn kaj 28 landajn sekciojn.

(5) Servoj: La Pasporta Servo de TEJO proponis en 1980 gastigon ĉe 360 adresoj en 48 landoj. Al enketilo pri la utiligo de la Servo respondis 186 gastigantoj, el kiuj 124 ricevis petojn, kaj 103 akceptis minimume unu gaston. La enketito montris, ke okazis entute 415 gastigoj en 27 landoj kaj, ke unu gastiganto pli ol meritigis tiun titolon, ĉar ties servojn utiligis 102 gastoj. Vojaĝantoj venis el 33 landoj (plej multe el Francio, Pollando, Japanio, FR Germanio kaj Hungario), kaj ili gastis plej multe en Britio, FR Germanio, Pollando kaj Svedio. Individuaj membroj de TEJO ricevas 50-procentan rabaton je la prezo de la adreslisto de la Pasporta Servo. Kiel en la antaŭaj jaroj, la Turisma Servo eldonis, kunlabore kun Monda Turismo, kalendaron de Esperanto-renkontiĝoj.



(6) Kongresoj: 332 partoprenantoj el trideko da landoj venis al la 36a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, inter la 25a de julio kaj la 1-a de aŭgusto, en Rauma (Finnlando). Inter ili unuafoje estis granda (17-persona) grupo el Soveta Unio. La ĉeftemo de la 36a IJK estis "Popola kultura tradicio en la nuntempa mondo". Granda grupo da gejunuloj vojaĝis el Rauma al Stokholmo por partopreni la 65an UK, en kies kadro okazis pluraj junularaj aranĝoj. Krome, la landaj sekcioj de TEJO organizis multajn semajnfinajn kunvenojn aŭ pli longajn junularajn renkontiĝojn, kiuj okazis ne nur en Eŭropo sed ankaŭ en Japanio, Koreo, Brazilo ktp. Aparte menciinda estas la iniciato de Germana Esperanto-Junularo, kiu jam duafoje organizis "festivalon por mezaĝuloj", kiu klopodas teni proksime al TEJO la mezan movadan generacion. Bone progresas la preparoj por la 37a IJK en Oaxtepec (Meksikio), en julio 1981, kaj por la 38a IJK en Leuven (Belgio), en 1982.

(7) Eldonaĵoj: *Kontakto*, revuo de TEJO, aperis regule en 1980. La kvar numeroj prezentis la temojn:

muziko, komputiloj, komparo de ekonomiaj sistemoj, alternativaj vivstiloj. La unuajn du numerojn redaktis Dario Besseghini (Italio) kaj Stefan MacGill (Nederlando), la trian gastredaktis Jim Cushing (Jugoslavio), dum la kvaran prizorgis D. Besseghini kaj Charles Power (Nederlando). La temon de tiu numero traktis la 24a Internacia Seminario de GEJ, pro kio ĉiuj seminarioj ricevis ekzempleron. Krom al 382 individuaj membroj de TEJO/UEA, *Kontakto* en 1980 iris ankaŭ al 37 patronoj de TEJO, 195 unuopaj kaj 50 kolektivaj abonantoj.

Koncize, novaĵbulteno de TEJO kaj pluraj landaj sekcioj, aperis sesfoje, fariĝis grafike pli alloga kaj superis la eldonkvanton de 2000 ekzempleroj. Ĝian TEJO-rubrikon redaktis Ian Jackson (Britio), kiu zorgis ankaŭ pri la regule aperinta "TEJO-paĝo" en la revuo *Esperanto*. La bulteno *NNN* (*News, Novaĵoj, Nouvelles*) aperis dum 1980 nur en la franca, sub redakto de Christian Darbellay (FR Germanio).

Ĉu vi parolas tendare? reeldoniĝis antaŭ la 36a IJK kaj rapide populariĝis en la lernolibra merkato. TEJO planas baldaŭ eldoni facilan lernolibron kaj esearon pri lingvo kaj demokratio.

(8) Eksteraj rilatoj: La plej sukcesa aranĝo de la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER) dum la jaro 1980 estis la seminario "Internacia komunikado — aplikado de Esperanto", kiu okazis en junio en la Eŭropa Junulara Centro en Strasburgo (Francio), kun financa subteno de ekstermovadaj instancoj kaj partopreno de 35 personoj el 14 landoj. Tuj post la seminario aperis samtitola raporto pri ĝi, redaktita de S. Bourrelly (Francio) kaj Y. Bellefeuille (Kanado). Respondeculo de KER por la okcidenta Eŭropo fariĝis Barbara Despiney (Francio), dum en la orienta Eŭropo tiun fakon prizorgas la prezidanto de TEJO, Csaba Lendvay.

TEJO reprezentigis en la jara konsultiĝo ĉe la junulara fako de Unesko, samkiel en la Ĝeneva Neformala Kunveno de junularaj organizaĵoj, kie oni diskutis la prearojn por la Jaro de la Junularo, proklamita de UN por 1985. KER planas refirmigi la rilatojn kun kelkaj gravaj junularaj organizaĵoj kaj aktivigi sur la kampo de la labortendaroj. Tiucele Martin Haase (FR Germanio) kompilis detalan liston de la Esperantaj labortendaroj dum 1981; tiu listo distribuiĝos ĉefe naci-lingve kaj ekster la Movado. Patrick Boets (Belgio) reprezentis la organizaĵon en konferenco pri labortendaroj en evolulandoj, kiu okazis en decembro en Bangalore (Hinda Unio). Ankaŭ por 1981 estas planitaj KER-seminarioj, kunlabore kun nemovadaj junularaj instancoj.

(9) Varbado: La Komisiono pri Varbado, elektita en Rauma, daŭrigis la laborojn super manlibro pri varbado kaj klopodas daŭre stimuli la produktadon de trafaj varbiloj. Okazis kampanjoj por pligrandigi la nombron de la patronoj de TEJO kaj de la abonantaro de *Kontakto*. Ekzistas ankaŭ aŭdvidaj projektoj, kaj oni planas apartan kunvenon pri varbado en la kadro de la 37a IJK en Meksikio.

(10) **Regiona agado:** La klopodojn de TEJO fariĝi pli tutmonda ilustras la decido okazigi la 37an IJK en Meksikio. Krome, Amri Wandel, vicprezidanto de TEJO, faris informvojaĝon tra Japanio kaj Koreo, kio intensigis la rilatojn kun la Esperanta junularo en tiu mondparto.

(11) **Konkludo:** Denove montriĝis, ke nepras kontinua laboro por ne perdi kontaktojn kaj rezultojn pene atingitajn. La streboj de TEJO denove havi volontulojn en la Centra Oficejo ŝajne sukcesos en 1981, sed por la postaj jaroj kandidatoj estas jam bonvenaj.

12. LANDA KAJ REGIONA AGADO

Estas konate, ke en malsamaj mondopartoj la stato de la Esperanto-movado estas malsama kaj malsamgrade kontentiga.

En la landoj de la okcidenta Eŭropo la Movado restas stabila. Dum la lastaj jaroj oni povis rimarki kelkajn sukcesojn precipe sur la kampo de rilatoj kun parlamentanoj, internaciaj registaraj organizaĵoj, kaj similaj superaj instancoj, sed ĉe la "bazo" la Movado ne ŝanĝiĝis. Kun kelkaj — eĉ gravaj — esceptoj, la kluba vivo restas pli malpli la sama de jardekoj, kaj la membroj de la lokaj kluboj ankaŭ restas la samaj, kun iom pli da grizaj haroj. Klopodoj altiri gejunulojn ofte restas nur klopodoj. Tio ne estas miriga, ĉar ankaŭ bonvolaj klub-gvidantoj kutime ofertas al hazarde kaptitaj junaj homoj vivon en medio, kiu idee postrestas la ĉirkaŭan socion. Tiumaniere niaj lokaj kluboj iĝas speco de inversa kribrilo, kies maŝoj lasas enflui en la movadon nur homojn kun apartaj emociaj bezonoj. Nur kelkaj lokaj kluboj, kies estraro kaj etoso pro kombino de hazardoj estas junecaj, kapablas altiri novajn "normalajn" homojn.

Ne estas mirige, ke, perdinte la esperon esperantigi la "amasojn", la gvidantoj de la okcidenteŭropaj landaj asocioj sin turnas al la "superaj instancoj": al registaroj, al parlamentanoj ktp., kun la espero atingi ian oficialan rekonon, kiu altigos la prestiĝon de la Movado kaj eble finfine konvinkos la "amasojn". Ne necesas substreki la danĝeron de tia rezigno-sinteno. Promesoj de registaroj utilas nur, se oni povas uzi ilin por havi pli da parolantoj de la lingvo. Kiam estos multaj uzantoj de la lingvo, politikistaj promesoj fluos senpete. Grandaj varbkampanjoj kun moderna enhavo povus esti unu el la elirvojoj. Tiucele laboris dum la pasinta jaro kelkaj asocioj, ekzemple la belga, la sveda kaj la brita. Ankaŭ francoj estas en pristudo-stadio de granda kunordigita inform-kampanjo.

Iom alia estas la bildo en la orienteŭropaj landoj. La atingoj de Pollando, Bulgario kaj Hungario, kiam temas pri starigo de amas-movado, restas senrivalaj en Eŭropo. Dum la pasinta jaro la Movado en tiuj landoj fariĝis ankaŭ torĉo-portanto rilate la aplikon de Esperanto en la scienco. La listo de ĉiuj seminarioj, eldonaĵoj, starigitaj komisionoj ktp. estus longa kaj ĉiukaze la legantoj de la revuo de UEA estas bone informitaj pri ili. Ĉi-rilate ni menciuj, ke la Trofeo Fyne, kiu estas

aljuĝata ĉiun duan jaron al la plej bona landa asocio de UEA, vojaĝas nun al Hungario.

Kompreneble ekzistas multspecaj problemoj ankaŭ tie. Ne eblas silenti pri la ĉefa el ili, tio estas pri la malfacilaĵoj kunligi la "socialisman" Esperantujon kun la cetera Esperanto-movado, kiuj restas daŭre disigitaj i.a. fare de la transpaga kurteno.

Krome, nur en kelkaj landoj la junulara movado ricevas la necesan atenton, kaj nekontentige solvitaj restas organizaj problemoj en difinitaj landoj, ekzemple: Rumanio kaj Soveta Unio, kies aliĝo-malfruo al la monda movado ne estas facile klarigebla.

Dum la pasinta jaro aliĝis al UEA la Ĉina Esperanto-Ligo. Tio ne estas simpla "statistika sukceso" pro plia, la 43a, aliĝinta landa asocio. Fakte, la ĉina movado en la lasta tempo modele progresas. Ĉiu nova numero de *El popola Ĉinio* portas informojn pri nova fondkunveno de provinca Esperanto-ligo. La agadplano de la estraro de ĈEL estas realigata paŝon post paŝo. La kunlaboraj rilatoj inter UEA kaj ĈEL povus servi kiel modelo de kunordigiteco por pluraj aliaj landaj asocioj, kies ĉefa celo ŝajnas esti elmontrado de sia sendependeco per ignorado de la komune deciditaj



kunlaboraj reguloj. Laŭ ĉiu ebla antaŭvido, Ĉinio promesas fariĝi post kelkaj jaroj unu el la mondaj fokusoj de la Esperanto-movado.

Sukcesojn sur la kampo de informado rikoltis la japana movado, kiu heziteme komencas transpreni respondecojn pri la disvastigo de Esperanto en Azio. Se oni prave kritikas la eŭropecon de la Movado, oni iam venu al decido mem fari ion, kaj oni ne permesu, ke Roterdamo estu la umbiliko de la mondo, la nura loko el kiu fluas lernolibroj, revuoj kaj "bonaj konsiloj" al la resto de la mondo.

Parolante pri Azio, oni ne rajtas forgesi la evoluon en Irano, Hinda Unio kaj Pakistano. Aparte laŭdan komenton meritas la iranaj esperantistoj, kies informado kaj instruado estis tre sukcesaj, malgraŭ la malfacilaj laborkondiĉoj. Pri la amasaj Esperanto-kursoj en Teherano abunde raportis la revuo de UEA. Ŝajnas, ke ankaŭ Vjetnamio ree ekviglas post iom da silento. En ĉiuj tiuj landoj UEA helpas la lokan Esperanto-movadon, nun ankaŭ pere de japanaj instancoj kaj unuopuloj.

En Nov-Zelando kaj Aŭstralio la Movado tro malrapide progresas. Lastatempe ĝi turnas sian atenton al la azia esperantistaro, kio povus montriĝi utila ambaŭflanke.

Preskaŭ kompletan fiaskon renkontis ĉiuj klopodoj — ili ja estis malmultaj kaj nekunordigitaj — en Afriko. En neniuj afrika lando ekzistas pli ol kerneto da unuopuloj, kiuj lernas la lingvon kaj esperas, ke iam eŭropaj esperantistoj — per iaj supozataj magia fortoj kaj monabundo — venos tien kaj disvastigos la lingvon. Tamen, laŭ decido de kunveno pri regiona agado, okazinta dum la Kongreso en Stokholmo, nun UEA iniciatas informkampanjon pri Esperanto pere de anoncoj en lokaj gazetoj en du afrikaj landoj. Estas ankoraŭ frue por raporti pri rezultoj. Intertempe oni daŭrigas sendadi informilojn kaj lernolibrojn al afrikaj petantoj.

Se UEA havus siajn "jarojn", kiel Unuiĝintaj Nacioj, 1981 certe estus la "Jaro de Ameriko". La 66a UK en Brazilo kaj la 37a IJK en Meksikio nedubeble helpas fortigi la ligojn inter la tutmonda kaj la amerika Esperanto-movado, kiu jam en 1980 montris eksterordinaran viglon, tiel en la nordo kiel en la sudo. La Pacifika Kongreso en Vankuvero kaj la Tutamerika Kongreso en Argentino estis la kulmino de la pasintjara agado. Evoluperspektivoj ekzistas nun ankaŭ en Kubo kaj en Venezuelo. Usono aparte rimarkigis pro esperantologiaj-lingvistikaj agadoj, kaj la estraro de Kanada Esperanto-Asocio pro celkonscia reorganiziĝo.

Ĉi tiu tre konciza prezento de la "farto" de la esperantlingva komunumo tra la mondo atingos sian celon, se la legantoj konsciiĝos pri la graveco de la loka kaj landa agado kaj trovos sian rolon en ĝi. UEA, ĝia estraro kaj ĝiaj oficistoj estas nur reprezentaj simboloj, nur adresoj por faciligi kontaktojn, nur statistikistoj por listigi sukcesojn kaj malsukcesojn, poŝtistoj por transporti al Brazilo japanajn eldonaĵojn ktp. Finfine, la progreso aŭ malprogreso de la Esperanto-movado estas plej bone mezurebla per la nombro de la komencantoj.

13. FAKA AGADO

Senperaj kontaktoj inter la komisiitoj de UEA kaj la aktivuloj de la fakaj asocioj helpas kompreni la situaciojn, eldiskuti problemojn, serĉi solvojn kaj atingi komunajn decidojn. Ĉiu membro de la Komisiono pri Faka Agado klopodis intimiĝi kun la problemaro de almenaŭ unu faka organizaĵo, tiel ke kreiĝis tre bona kunlabora etoso kun la fakaj asocioj de poŝtistoj, fervojistoj, ĵurnalistoj, matematikistoj, sciencistoj, ekologoj, komputistoj, medicinistoj k.a. Multe helpis ĉi-rilate ankaŭ la konscienca oficotransdono de la antaŭa estrarano pri faka agado, prof. C. Støp-Bowitz. Iom embarasa montriĝas la kompleta eŭropeco en la konsisto de la Komisiono, kiu devus enhavi ankaŭ reprezentantojn el Azio kaj Ameriko, kie kelkaj fakoj aparte intense laboras.

Tiurilate eblas lerni el la ekzemplo de UMEA (medicinistoj), kies estraro tre intime kunlaboras, kvankam ĝiaj membroj vivas en Azio, Ameriko kaj Eŭropo. UMEA bone kunlaboras ankaŭ ekstermovade sur sia

kampo kaj tie sukcesas trovi eĉ financon subtenon por esperantistaj fakaj entreprenoj. Tio verŝajne konstatablos ankaŭ en la 3a Internacia Medicina Esperanto-Konferenco en Ruse (Bulgario), meze de julio 1981. Simile estas pri du konferencoj, kiujn preparas ekologoj (en Hungario kaj Bulgario).

Kelkaj fakaj asocioj, tradicie, aranĝis siajn apartajn kongresojn dum 1980: fervojistoj (en Nederlando), blinduloj kaj kristanoj (Svedio), vegetaranoj (Pollando). Monda Turismo organizis sian 6an Internacian Foiron en Pollando, kaj ŝakistoj aranĝis la 10an ŝakfestivalon en Ĉeĥoslovakio; instruistoj iris kun sia konferenco al Malto, dum matematikistoj kaj fakuloj pri informadiko okazigis sukcesajn laborkunvenojn en Budapeŝto.

Kvankam la organiza situacio ĉe la sciencistoj (ISAE) ankoraŭ ne plene klariĝis (problemojn spertas i.a. la *Scienca revuo*), fondiĝis en ĝia kadro aparta sekcio de komputistoj.

Preskaŭ ĉiuj fakaj asocioj eluzis la okazon por kunveni dum la 65a UK en Stokholmo. Tie estis organizita ankaŭ la Asembleo de Fakaj Asocioj, kiu i.a. traktis la estontecon de la komuna bulteno *Interfake*, kies 9a numero aperis antaŭ la Kongreso. Aperis ankaŭ la 10a numero de *Interfake* kaj estis komplete dediĉita al la fako de komputistoj.

Kiel en la antaŭaj jaroj, daŭras la terminologiaj laboroj i.a. ĉe fervojistoj, matematikistoj, aŭtomobilistoj, medicinistoj, muzikistoj.

La Komisiono pri Virina Agado, kun la koncerna estrarano de UEA, faris preparojn por seminario, kiu okazis fine de februaro 1981 en Roterdamo. La Komisiono prizorgis ankaŭ plurajn programojn de la Kongreso en Stokholmo.

Kelkaj fakaj asocioj daŭre eldonas apartajn revuojn pri sia labortereno: *La mevo* (ornitologoj), pluraj fervojistaj gazetoj, *Matematiko translimen*. Daŭris ankaŭ la eldonado de la memstaraj fakaj revuoj *Homo kaj kosmo* kaj *Scienca mondo*. En 1980 aperis pliaj fakaj kajeroj de Someraj Universitataj Kursoj, kies nova sesio okazos meze de 1981.

Tra 1980 multrilate konkretiĝis la planoj pri la starigo de UEA-filio en Budapeŝto. Ĝi certe ekfunkcios plej malfrue meze de 1981. Kiel konate, UEA intencas, ke tiu ĝia filio ĉefe koncentriĝu ĝuste je la faka laboro, scienca kaj popularscienca eldonado. Tio povus montriĝi tre grava evento por la ĝenerala disvolviĝo de la faka agado en Esperanto.

14. ESPLORO KAJ DOKUMENTADO

La Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED), kiu dum pluraj jaroj laboris pere de malgranda, esence transira estraro, nun havas, laŭ decido de la Komitato, pli multnombrian kaj pli laborkapablan estraran teamon, sub la respondeco de la estrarano pri esploro kaj dokumentado, d-ro Tonkin. La eldonado de la revuo de CED, *Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado*, nun stabiligis ĉe la eldonejo de la Universitato de

Teksaso, kaj la redaktoro de *LPLP*, d-ro Richard Wood, komencis aperigi tutan serion da interesaj artikoloj pri la aspektoj de la lingva problemo. Tamen, CED ankoraŭ faras apartajn klopodojn trovi kaj instigi bonajn artikolojn, kiuj donus teorianton bazon por la studado de lingvaj problemoj je internacia skalo — io, kio ankoraŭ ege mankas.

La 3a Esperantologia Konferenco okazis dum la 65a UK en Stokholmo sub la gvido de d-ro Detlev Blanke kaj kun partopreno de specialistoj pri tiu kampo. La kvar prelegoj de la Konferenco estis abunde vizititaj, same kiel kelkaj prelegoj en la Internacia Kongresa Universitato, kiuj tuŝis la esperantologojn. Plianta esperantologian konferencon oni planas por Brazilio.

1980 estis signifa jaro rilate la libroeldonadon, precipe pro la apero de la aliloke aluditaj *Plena analiza gramatiko* kaj "iam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof" (v. *Esperanto*, dec. 1980). Pluraj nacilingvaj verkoj aldoniĝis al la esperantologia kaj interlingvistika verkaro. En sia jara bibliografio, internacia rekonata konsultlibro por filologoj kaj lingvistoj, kiun eldonas Modern Language Association (Asocio pri Modernaj Lingvoj) en Usono, aperigis multe ampleksigitan liston (kelkajn paĝojn longan) de aktualaj esperantologiaj kaj interlingvistikaj verkoj aperintaj precipe en 1979. Tiun iniciaton oni dankas ĉefe al d-ro W.A. Verloren van Themaat (Nederlando). D-ro Tonkin estis nomita bibliografiisto por la koncerna sekcio pri la jaro 1980.

15. FINAJ VORTOJ

Dum la periodo, kiun koncernas ĉi tiu raporto, finiĝis la mandato de la malnovaj, kaj en Stokholmo elektiĝis gvidorganoj de UEA en la nova konsisto. Inter la agadrezultoj de la Asocio nepre estas menciinda la paca ŝanĝo de la postenoj en UEA kaj la daŭra harmonia kunlaboro en la Komitato kaj Estraro. Nun estas tre grave, ke tiu favora etoso kaj aliaj pozitivaj tendencoj en la laboro de la Asocio plifirmiĝu, ke la reputacio de UEA en la ekstermovadaj rondoj daŭre altiĝu kaj, ke ni forte strebu al plena tutmondiĝo de UEA pere de pli aktiva agado en la mondopartoj kie la Movado ankoraŭ estas malforta. Same, necesas insiste labori, ke la rekorda nombro de la asociaj kaj la signifa kresko de la individuaj membroj en 1980 montriĝu — ne hazardaj kaj eksterordinaraj rezultoj de la pasinta jaro, sed ili pruvigu esti signo de grava kaj daŭra membrokresko de la Asocio. Ni ja ofte parolas pri tio, ke ni ne plene utiligas la homan potencialon de la Asocio. Tamen, oni povas paroli ankaŭ pri la fakto, ke la nuntempaj UEA kaj la Esperanto-movado ĝenerale havas difinitan laborkapaciton kaj, se ni deziras agi pli vastskale, ni bezonas pli da homa potencialo, pli da organizita membraro, ĉar tio donas eblojn por ne malŝpari niajn limigitajn fortojn kaj por tutmonde kunordigi la laboron por la progresigo de la Internacia Lingvo. Ni staras antaŭ la baldaŭa centjara jubileo de Esperanto. Ni pretiĝu por dece celebri ĝin, ne tiom per pompaj festoj, kiom per pli intensa kaj pli celtrafa laboro.

Financaj aldonaĵoj al la Raporto

(Ĉiuj sumoj estas en nederlandaj guldenoj)

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO SPEZOJ POR LA JARO 1980

KOSTOJ	Buĝeto	Rezultoj
Salajroj malnete	244 000	232 518,20
Sociaj asekuroj pagataj de UEA	47 100	45 044,65
Minus kompensoj pro malsano	- 1 800	- 6 408,46
Salajroj, nete	289 300	271 154,39
Afranko kaj telefono, nete	24 200	19 092,34
Presaĵoj	8 000	6 211,15
Materialoj	8 300	8 611,97
Riparo de maŝinoj	3 000	8 113,48
Revizoroj, trinkaĵoj k.a.	2 900	2 092,45
Oficejo, nete	46 400	44 121,39
Fotokopiado	5 500	5 188,96
Minus vendoj kaj kompensoj	- 4 500	- 2 177,83
Fotokopiado, nete	1 000	3 011,13
Gasoj, elektro, akvo	6 000	6 938,90
Riparo de la domo, purigiloj	4 800	3 149,06
Asekuro kaj impostoj	2 500	3 666,96
Minus lupagoj pro ĉambroj	- 2 000	- 1 403,73
Oficeja domo, nete	11 300	12 351,19
Preskostoj, "Esperanto"	36 800	36 535,00
Sendokostoj	36 600	44 467,81
Kovertoj	5 000	2 450,00
Grafikaj k.a. kostoj	33 100	33 513,77
Minus anoncoj	- 14 000	- 13 735,06
"Esperanto", nete	97 500	103 231,52
Preskostoj de la Jarlibro	16 400	18 100,00
Sendokostoj	8 400	13 506,64
Kovertoj	700	1 176,52
Grafikaj k.a. kostoj	11 600	12 428,00
Minus anoncoj	- 10 000	- 12 080,85
Jarlibro, nete	27 100	33 130,31
Preskostoj "Kontakto"	5 800	6 033,00
Sendokostoj	2 700	4 463,76
Kovertoj	900	550,00
Grafiko k.a. minus anoncoj	7 600	7 751,77
"Kontakto", nete	17 000	18 798,53
"Koncize"	---	2 000,00
Veturkostoj oficejaj	6 900	4 077,26
Vojaĝkostoj kongresaj	11 000	19 948,81
Vojaĝkostoj Estraro UEA	14 900	23 849,06
Vojaĝkostoj Estraro TEJO	1 800	1 800,01
Reprezentaj kostoj	2 600	2 062,79
Komisionoj kaj komisiitoj	1 100	954,71
Vojaĝ- kaj restad-kostoj	38 300	52 692,64
Volontula Servo	10 000	21 580,33
Korespondo estrara k.a.	8 400	13 863,01

Bankkostoj	2 400	2 214,51
Kurzperdoj	4 200	5 813,13
Premioj kaj donacoj	6 000	5 191,14
Postpagitaj kaj diversaj kostoj	400	3 201,12
Ĝeneralaj kostoj, entute	13 000	16 419,90
Deprezo de la domo, ĉ. 1%	1 300	1 300,00
Deprezo de maŝinoj, mebloj	6 200	5 156,39
Deprezoj, entute	7 500	6 456,39
Pozitiva saldo	---	649,58
Sumo de la kostoj	566 800	599 460,31

RIMEDOJ	Buĝeto	Rezultoj
Kotizoj MJ	20 500	21 742,94
Kotizoj MA	184 700	188 151,44
Kotizoj MJ-K	2 100	2 489,89
Kotizoj MA-K	7 800	8 857,75
Asociaj membroj UEA	18 400	19 016,08
Asociaj membroj TEJO	6 700	6 317,72
Simplaj abonoj "Esperanto"	6 900	7 119,95
Kolektivaj abonoj "Esperanto"	25 200	23 984,52
Kongresaj abonoj "Esperanto"	9 900	10 422,32
Abonoj "Kontakto"	3 800	4 075,53
Kolektivaj abonoj "Kontakto"	200	233,00
Societo Zamenhof	21 800	22 832,29
Kotizoj de fakaj organizaĵoj	1 600	1 589,57
Kotizoj entute	309 600	316 833,00
Donacoj al la Ĝenerala Kaso	6 500	8 934,98
Vendoj de la libroservo	191 000	161 322,99
Minus kostoj de la varoj	-123 500	-110 484,76
Minus katalogaj kostoj	- 15 800	- 12 509,33
Minus aliaj kostoj	- 5 300	- 3 283,38
Triono de sendokostoj	6 000	5 219,70
Libroservo, nete	52 400	40 265,22
Abonoj je nepropraj gazetoj	7 100	7 831,87
Minus kostoj de la gazetoj	- 4 400	- 5 027,82
Abonservo, nete	2 700	2 804,05
Grafikaj laboroj Roterdamo	200 000	90 319,45
Minus kostoj eksteraj	-120 000	- 32 277,56
Grafikaj laboroj Roterdamo	80 000	58 041,89
Grafikaj laboroj Antverpeno	138 600	108 888,06
Subvencioj k.a. rimedoj		18 029,09
Minus salajroj, kompensoj	-110 000	- 62 423,99
Minus materialoj		- 31 089,14
Minus ejaj kostoj (luo k.s.)		- 7 357,46
Minus deprezoj k.a. kostoj		- 7 942,60
Grafikaj laboroj Antverpeno	28 600	18 103,96
20% de UK-kotizoj	24 800	37 900,47
50% de licencpago de IJK	4 500	4 277,52
Kongresoj, entute	29 300	42 177,99

REVIZORAJ RAPORTOJ kaj KONGRESA SPEZOKONTO de STOKHOLMO ne aperas aldone al tiu ĉi Estrara Raporto. Pro teknikaj kialoj tiuj financaj dokumentoj ne estis pretaj ĝis la redaktofino de ĉi tiu revunumero. Tamen, ili certe pretos ĝis la Kongreso en Brazilio, kie la Komitato traktos la Raporton.

Turismaj aranĝoj	200	10 253,67
Rento ricevita	41 000	52 523,96
Minus rento pagita	- 3 000	- 2 182,13
Rento, nete	38 000	50 341,83
Kurzgajnoj	---	8 893,52
Postricevitaj k.a. rimedoj	1 000	2 728,31
Vendo de uzitaj poŝtmarkoj	4 500	5 009,15
Ĝeneralaj rimedoj, entute	5 500	16 630,98
Kompensoj	12 700	31 683,74
Subvencioj	1 300	3 389,00
Kompensoj kaj subvencioj	14 000	35 072,74
Sumo de la rimedoj	566 800	599 460,31

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO BILANCO JE LA 31a DE DECEMBRO

AKTIVOJ	1979	1980
Kurantaj bankkontoj	11 322,64	23 987,16
Bankaj ŝparkontoj	130 522,84	134 552,32
Poŝtĉekkontoj	25 229,79	47 065,57
Kasoj, respondkuponoj	3 924,30	1 604,93
Sumoj transpagataj	4 321,25	4 947,84
Monrimedoj entute	175 320,82	212 157,82
Valorpaperoj	278 945,00	278 185,00
Ricevotaj rimedoj	104 175,53	17 279,75
Antaŭpagitaj kostoj	22 735,78	67 272,88
Debitoroj	172 536,92	156 204,25
Prunto al Inst. Hodler 2%	3 472,25	3 472,25
Prunto al Inst. Hodler 10%	---	112 300,60
Institucio Hodler '68	3 472,25	115 772,85
Provizoj libroservaj	156 128,69	152 957,24
Presaĵoj, materialoj k.s.	47 843,26	52 229,59
Provizoj entute	203 971,95	205 186,83
Maŝinoj kaj mebloj	41 416,52	58 115,58
Garantiaj sumoj	15 950,78	20 942,78
Domo en Roterdamo	126 400,00	125 100,00
Tereno Aspremont	1,00	1,00
Sumo de la aktivoj	1 144 926,55	1 256 218,74

PASIVOJ	1979	1980
Rezervo libroserva	15 000,00	15 000,00
Rezervo (domriparoj)	8 878,43	536,43
Rezervoj entute	23 878,43	15 536,43
Antaŭricevitaj rimedoj	84 607,51	107 418,93
Pagotaj kostoj	87 414,14	38 022,14
Kreditoroj	296 627,66	303 240,32
Ŝparkontoj de membroj	978,68	63 578,68
Fondaĵo Azio-Afriko	1 000,00	8 262,92
Fondaĵo Evolulandoj	5 603,20	4 103,20
Fondaĵo Canuto	1 338,32	674,73
Fondaĵo EKI	13 505,65	13 286,54
Fondaĵo Enciklopedio	955,67	1 266,27
Eldona Fondaĵo	2 841,79	8 886,30
Financa Programo	39 469,88	31 136,17
Kongresa Rezerva Fondaĵo	34 442,78	34 442,78

Fondaĵo Oficeja Ilaro	0	3 397,59
Premio Jozefo Petrin	466,57	417,49
Premio Raymond Schwartz	4 304,82	---
Propaganda Konto	47 082,22	46 391,17
Fondaĵo Scienco kaj Tekniko	---	9 989,55
Fondaĵo TEJO	20 655,34	22 952,11
Fondaĵo TEJO (KER)	-1 087,06	6 522,60
Fondaĵo UN/Unesko	0	6 998,59
Fondaĵoj entute	170 579,18	198 728,01
Kapitalo Dumv. Memb.	297 700,60	322 804,69
Cetera kapitalo	183 140,35	206 889,54
Asocia kapitalo entute	480 840,95	529 694,23
Sumo de la pasivoj	1 144 926,55	1 256 218,74

BUĜETO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO POR LA JARO 1982

KOSTOJ

Salajroj malnete	270 000
Sociaj asekuroj pagataj de UEA	53 600
Salajroj, nete	323 600
Afranko kaj telefono, nete	28 400
Presadoj	9 600
Materialoj	7 300
Riparo de maŝinoj	7 600
Trinkaĵoj; revizoroj k.a.	2 200
Oficejo, nete	55 100
Fotokopiado, nete	3 000
Gasoj, elektro, akvo	7 900
Riparo de la domo, purigiloj	3 600
Impostoj je la domo, asekuro	4 400
Minus lupagoj pro ĉambroj	- 2 000
Oficeja domo, nete	13 900
Preskostoj, "Esperanto" (10 n-roj)	34 500
Sendokostoj	57 600
Kovertoj	2 600
Grafikaj k.a. kostoj	31 500
Minus anoncoj	- 12 000
"Esperanto", nete	114 200
Preskostoj de la Jarlibro	19 200
Sendokostoj kaj kovertoj de la Jarlibro	20 900
Grafikaj k.a. kostoj	15 200
Minus anoncoj	- 12 100
Jarlibro, nete	43 200
Preskostoj "Kontakto"	5 800
Sendokostoj kaj kovertoj	3 600
Grafikaj k.a. kostoj, minus anoncoj	8 200
"Kontakto", nete	17 600
"Koncize"	2 200
Veturkostoj oficejaj	5 100
Vojaĝkostoj kongresaj	3 800
Vojaĝkostoj Estraro UEA	16 000
Vojaĝkostoj Estraro TEJO	2 000
Reprezentaj kostoj	2 400
Vojaĝkostoj de komisionoj kaj komisiitoj	1 600
Vojaĝ- kaj restad-kostoj	30 900

Volontula Servo	8 100
Korespondo estrara kaj komisiona	8 800
Bankkostoj, kurzoperdoj	7 600
Premioj kaj donacoj	6 800
Postpagitaj k.a. kostoj	1 100
Ĝeneralaj kostoj, entute	15 500
Deprezo de la domo, ĉ. 1%	1 800
Deprezo de maŝinoj, mebloj	30 000
Deprezoj, entute	31 800
Sumo de la kostoj	667 900

RIMEDOJ

Kotizoj MJ (Membro kun Jarlibro)	24 200
Kotizoj MA (Membro-Abonanto)	209 000
Kotizoj MJ-K (kun "Kontakto")	2 800
Kotizoj MA-K (kun "Kontakto")	9 900
Aligitaj (asociaj) membroj UEA	21 100
Aligitaj (asociaj) membroj TEJO	7 100
Simplaj abonoj "Esperanto"	7 900
Kolektivaj abonoj "Esperanto"	21 300
Kongresaj abonoj "Esperanto"	14 100
Abonoj "Kontakto"	4 500
Kolektivaj abonoj "Kontakto"	600
Societo Zamenhof	25 400
Kotizoj de fakaj organizaĵoj	1 800
Kotizoj entute	349 700
Donacoj al la Ĝenerala Kaso	9 000
Vendoj de la libroservo	186 500
Minus kostoj de la varoj	-120 400
Minus katalogaj kostoj	- 13 300
Minus tantiemoj kaj aliaj kostoj	- 5 300
Triono de sendokostoj	12 400
Libroservo, nete	59 900
Abonoj je nepropraj gazetoj	8 400
Minus kostoj de la gazetoj	- 5 500
Abonservo, nete	2 900
Grafikaj laboroj, Roterdamo	50 200
Minus kostoj eksteraj	- 8 900
Grafikaj laboroj Roterdamo	41 300
Grafikaj laboroj Antverpeno	30 000
Budapeŝta Esperanto-Centro	75 000
Minus ĉiuj kostoj	- 75 000
Budapeŝta Centro, nete	0
20% de UK-kotizoj	45 000
50% de licencpago de IJK	4 000
Kongresoj, entute	49 000
Turismaj aranĝoj	10 000
Rento, nete	48 500
Kurzgajnoj	5 900
Postricevitaj rimedoj	1 000
Vendo de uzitaj poŝtmarkoj	5 000
Ĝeneralaj rimedoj, entute	11 900
Kompensoj kaj subvencioj	55 700
Sumo de la rimedoj	667 900

FINO DE LA ESTRARA RAPORTO

Kubo

- Kvankam oficiale fondita nur antaŭ du jaroj, Kuba Esperanto-Asocio jam nombras ĉ. 1400 membrojn. Tra la lando daŭre okazas amasaj Esperanto-kursoj, kiujn partoprenas multaj centoj da homoj. Tio estas la nuna taktiko de la Asocio: unue amase diskonigi la lingvon pere de la kursoj, kaj poste ekfendi lokajn Esperanto-klubojn.

Nederlando

- En Roterdamo, inter la 15a kaj 21a de junio okazos la 12a Internacia Poezia Festivalo. Estas faritaj pluraj provoj penetrigi Esperanton ĉe tiu ĉi renoma kultura aranĝo. Rezultis konsento, ke esperantistoj povas instali informan librostandon tie kaj partopreni tradukan konkurson, kiu okazas samtempe kun la Festivalo. Ĉi-jare la konkurso okupiĝos pri la verkoj de Erich Weinert, poeto el Germana Demokratia Respubliko. Tradukojn oni laŭtlegos al amasa publiko kaj multnombraj ĵurnalistoj, kaj ankaŭ eldonos ilin libro-

forme, poste. Pri partopreno kontaktu s-inon J.C. van Veenendaal, Kappelweg 2, 1906 EA Limmen, Nederlando (tel. 02205 - 1473).

Japanio

- Al Claude Nourmont-Moon, kiu dum la lastaj monatoj vojaĝis tra pluraj landoj de Azio (Hinda Unio, Nepalo, Korea Respubliko), en Japanio aliĝis la edzo, Brian Moon, ankaŭ komitatano de UEA. En marto ili ambaŭ prelegis ĉe la sidejo de Japania Esperanto-Instituto — Claude pri Pollando, Brian pri "La lingva situacio de Eŭropa Komunumo". Claude poste prelegis aŭ partoprenis Esperanto-renkontiĝojn en sep aliaj japanaj urboj.

Hispanio

- Ĵus aperis la unua numero de *Social-humanista gazeto*, dulingva periodaĵo — en la kataluna lingvo kaj en Esperanto. En la 36-paĝa kajero aperas intervjuoj kaj artikoloj divers-temaj, i.a. pri politikaj kaj sociaj demandoj. La eldonantoj de la nova gazeto (Poŝtfako 313, Terrassa, Hispanio) planas poste aperigi ankaŭ alilingvajn eldonojn, ĉiam kun Esperanto kiel la dua lingvo.

Irano

- Jam de pluraj monatoj en Teherano regule funkcias neordinara Esperanto-kurso. Temas pri kelkdeko da oficiroj de la irana aer-armeo, kiuj dum pluraj horoj ĉiutage lernas la Internacian Lingvon. Kompreneble, kiel ni jam plurfoje raportis, en la ĉefurbo kaj aliloke tra la lando okazas ankaŭ amaso da aliaj Esperanto-kursoj.

Fake

Libroj

- Laŭ ĵusa sciigo, la Libroservo de UEA tre baldaŭ disponos pri la restinta stoko de tri gravaj libroj, eldonitaj de Juan Régulo Pérez en Kanariaj Insuloj. Nun, kiam ni anoncas la aperon de la nova libro de Beaucaire (v. la paĝon 99), haveblos denove ankaŭ lia verko *El la vivo de bervalanta sentaŭgulo*. Al Roterdamo venas ankaŭ *Norda naturo* de la forpasinta Hilda Dresen kaj la satira kolekto *Elingita glavo* de "Verdiro". En baldaŭa estonteco, espereble, venos ankaŭ ĉiuj aliaj eldonaĵoj de la malnova Stafeto, kies ĉefa distribuanto nun fariĝas la Libroservo de UEA. Alia grava novaĵo libromarkata estas la reeldono de *Dia komedio* de Dante en la traduko de Peterlongo; ĝi nun estas broŝurita sed samformata kaj kun la samaj ilustraĵoj kiel antaŭe (prezo: 69,00 guldenoj).

Someraj Universitataj Kursoj

- En ĉiuj niaj numeroj ĉi-jaraj (vidu ankaŭ ĉi-foje) aperis anoncoj pri la 5a sesio de Someraj Universitataj Kursoj en Lieĝo (Belgio). Ankaŭ tiu sesio, en julio ĉi-jare, kiel pluraj antaŭaj okazos sub la aŭspicio de UEA. Ekologio kaj pedagogio estas la te-

moj al kiuj dediĉiĝos la ĉi-jara SUK. Kiel regule okazis en la antaŭaj jaroj, poste aperos novaj sciencaj kajeroj de SUK, kiuj en la lastaj dek jaroj — tiom aĝas SUK — estas la plej serioza provo riĉigi la fakan literaturon en Esperanto.

Teatro

- TESPA, Esperanta teatra trupo, kiu jam de kelkaj jaroj aktivas en Parizo, komencas roli sur la teatra kampo simile al tio kion faras Someraj Universitataj Kursoj en la scienca sfero: TESPA ne nur okazigas siajn prezentaĵojn sed ankaŭ eldonas, libroforme, la prezentitajn tekstojn. Krome, TESPA publikigas teatran periodaĵon *Kulisoj internaciaj*. En Francio ekagas plia Esperanta teatro — Krizalido —, kiu laste prezentigis la 24an de aprilo en Parizo, per la teatraĵo *Ĉu dio bojas?* de François Boyer. TESPA premieros denove la 23an de majo (Centro Jean Verrier, 11 rue de Lancry, 75010 Paris) per la prezento de *Boks kaj Koks*, de John Maddison Morton.
- Unu el la plej malnovaj agantoj sur la kampo de la Esperanta teatro, Alexander Starke el Nürnberg (FR Germanio), festos la 12an de majo




- Ĉilio: Iván Mättig, UEA-delegito en Santiago, partoprenis antaŭ nelonge grandan aranĝon "Nacia ekspozicio de hobioj" en la ĉefurbo de Ĉilio. La ekspoziciaĵo estis filatela kolekto de kovertoj el 60 landoj (sur la foto, kun la kolektinto), kiu vekis tre grandan intereson pri Esperanto, precipe ĉe filatelistoj.

sian 90an datrevenon. Antaŭe, Starke ankaŭ prelegvojaĝis pri Esperanto tra pluraj landoj de Eŭropo. Preskaŭ sesdek jarojn li membras en la loka Esperanto-grupo kaj ĝis la pasinta jaro servis kiel delegito kaj fakdelegito de UEA.

Ekologio

- Inter la 5a kaj 11a de julio, en Gyula (Hungario), okazos la 19a Somera Esperanto-Universitato (TIT, 48-as u. 11, H-5700 Gyula). Ĉi-jare ĝi havos apartan karakteron, ĉar en ĝia kadro okazos seminario pri ekologiaj demandoj (la plasto kaj la medioprotektado; transformado de la medio kaj la birdaro). La



FREMURA

APERIS LA LISTO DE LA GASTIGANTOJ 1981, kun 410 gastiglokoj en 48 landoj!

TEJO-membroj trovos en "Kontakto" 1981/1 kuponon, kiu proponas 50-procentan rabaton je aliĝo.

Perantoj en pluraj landoj akceptos aliĝojn en la loka valuto. La listo (libro) estas akirebla ankaŭ ĉe: J.-M. Cash, 5 allée des Félibres, F-31520 Ramonville St.-Agne, Francio (18FF aŭ 9 int. respondkupoj. Ĉe la Libroservo de UEA la prezo estas 9,00 gld., plus sendokostoj.

seminaron organizas Scienca Komisiono de Hungara Esperanto-Asocio (Pf. 193, H-1368 Budapeŝto). Ĝis la fino de majo ĉi-jare bonvenas proponoj (kun resumo) pri sciencaj kontribuoj al la seminario.

Universitatoj

- En majo kaj junio ĉi-jare, la Instituto por Edukaj Sciencoj en la Universitato de Santiago (Hispanio) okazigos 50-horan seminaron pri esperantologio kaj interlingvistiko. Ĝi estas destinita ĉefe al la universitataj instruistoj. Prelegos d-rino Maria Rafaela Urueña Alvarez, prezid-

antino de Hispana Esperanto-Federacio, kaj s-ro Antonio Alonso Núñez, kiu jam de kelkaj jaroj instruas la lingvon en tiu Universitato.

Ŝparu ĉe UEA! La unuaj membroj, kiuj faris fiksdajn mondeponojn ĉe UEA, jam ricevis la 6-procentan renton por la unua duonjaro. Ankaŭ via mono povas doni al vi renton de 6% en guldenoj. Samtempe vi helpas la Asocion. Petu la regularon ĉe la Centra Oficejo, por informiĝi detale.

Se Esperanto servu la interrilatojn, ne hezitu per Esperanto ekscii kiel kontakti homojn tro ofte evitatajn, la handikapulojn. Legu *Ne tiel sed ĉi tiel* kaj *Ĉu ne eblas ĉi tiel*? Klubo netranspagipovaj mendu senpage ĉe: Esperantisto, van Speijkstr. 28, 3014 VL Rotterdam, Nederlando.

Persone



- Hansjörg Kindler, pli konata en la Movado kiel "Trixi", ĵus finis sian 5-monatan vojaĝon tra Azio, dum kiu li vizitis Hindan Union, Nepalon, Tajlandon, Singapuron, Indonezion, Makaon, Hongkongon kaj Ĉinion. Kvankam la vojaĝo inkluzivis 17 magiajn prezentaĵojn, Kindler en tiuj landoj ofte prelegis, publike kaj private, pri Esperanto. Plurfoje temis ne pri prelegoj en Esperanto-klubo sed pri prezento de la Internacia Lingvo al ekstermovada publiko (lernejo, banko, rotaria klubo ktp). Sur la supraj fotoj videblas Kindler dum kaj post prezentoj en Nova Delhio, kune kun esperantista grupo de la ĉefurbo de Hinda Unio. La blonda, barbohava junulo dekstre estas Patrick Boets (Belgio), kiu lastatempe pasigis kelkajn monatojn en Hinda Unio. Kindler nun haltis en sia Luksemburgo por kelkaj tagoj, antaŭ ol denove ekvojaĝi al Aŭstrio, FR Germanio kaj Belgio. Kompreneble, li ne intencas poste manki ĉe la 66a Universala Kongreso en Brazilo.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,85 guldenon (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj mem, kiuj bonvolu memori, ke rabaton por sinsekvaj ripetoj ni donas nur al enkadrigitaj anoncoj, kiel tiuj sur la kontraŭa paĝo, sed ne al anoncetoj.

26-jara profesoro pri biologio deziras interŝanĝi kasetojn pri folkloro muziko tutmonde. Norberto Mollo, Asambleo 480, RA-6100 Rufino (Santa Fé), Argentino.

Studi matene, ferii posttagmeze, jen la kursformulo de la Internacia FERIA Altlernejo de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando). Petu informilon!

Vendo! Jarlibroj de UEA, de 1909 ĝis 1929. Ofertojn sendu al s-ro L. OhUiginn, P.O. Kesto 801 "B", Ottawa, Ont., Kanado K1P 5P9.

Aŭtorino de biografio deziras kontakti personojn, kiuj konis f-inon Lidia Zamenhof. Bonvolu skribi al f-ino W. Heller, Box 100, Temple City CA 91780, Usono.

Vi parolas Esperanton, sed ankaŭ vi devas studlegi en la angla. Do, kial ne mendi viajn anglalingvajn librojn rekte de esperantista librovendejo en Anglujo? Mendu de Language Services, 17 High Street, St. Peter's, Broadstairs. Atentigu ankaŭ viajn kolegojn.

Angla, japana aŭ usona esperantist(in)o, kiu akceptos gaŭĉan memoraĵon kaj partoprenos la 66an UK en Brazilio, bonvolu leteri: Egon Breitenbach, Caixa Postal 417, Porto Alegre (RS), Brazilo.

Ĉe-kursoj necesas! Kurso tuj paroliga: *Esperanto laŭ la patrina metodo*. 320 paĝoj, DM 50,00. La kursokonversacio nur en Esperanto. August Weide, Nordalbingerweg 65, D-2000 Hamburg 61. Poŝtĉekkonto Hamburg 150 58-209.

11a intima "Amikec-kongreso sen paroladoj" en Bad Münstereifel (FR Germanio): 11-16a de julio 1981, por praktiki Esperanton kaj amikiĝi en la romantika kolonia regiono. Petu informojn al s-ro Pierre Delaire, B.P. 2002, F-45010 Orléans, Francio.

S-ro Delaire, ĉi-supra adreso, deziras ricevi por siaj ĉiuagaĝaj gelernantoj leterojn de korespondemuloj. Ne respondos sed transdonos.

L'Espéranto vivant, 104-paĝa metodo . . . metoda por franclingvanoj. Kompletata kurslibro alloga. 68 frankoj, afrankite. Mendu ĉe la aŭtoro: Pierre Delaire, ĉi-supra adreso. Poŝtkonto: 271-69 X F-La Source.

Esperanto-Unuiĝo Aachen, FR Germanio, invitas al la Trilanda Esperanto-Renkontiĝo de la Euregio Rejno-Mozo en 5108 Monschau, Germanio (Eifel-Montaro) de la 30-5-1981, 09.00 h. ĝis 31-5-1981, 18.15 h. Atendos vin riĉa programo! Kunvenejo: Junulargastejo (Jugendherberge) Hargard-Monschau. Kontaktadreso: Wolfgang Bienen, Eynattener Str. 56, D-5100 Aachen.


Aperos en majo

FABELOJ DE LA VERDA PIGO

Kolektitaj de Louis Beaucaire

Frandaĵo por ĉiuj inter 5- kaj 95-jaraj, kiuj ŝatas sanan ridon kaj bonan humuron.

Ĉiuj popoloj havas sian fabeliston: la danoj H.C. Andersen, la germanoj Grimm, la francoj La Fontaine ktp. ktp. ... la esperantistoj nun havas Beaucaire !!!



Pli ol 50 tutpaĝaj ilustraĵoj;

TK/STAFETO 112 paĝoj; prezo 295 BF.

MISTRAKTO DE ĈEVALOJ

POST militoj kaj similaj katastrofoj, ni ofte miras pri hororaj kruelaĵoj, pri "besta" konduto de la homoj dum tiaj periodoj. Verdire, la bestoj kondutas multe malpli "beste" kaj multe pli "home" ol tion kapablas fari homoj mem. La homoj ne ĉesas ĉiutage trejni sin en la metio de hororo eĉ dum la tiel nomataj "pacaj periodoj", des pli ke oni en ĉi tiu mondo senriproze militas kaj torturas en almenaŭ kelkaj anguloj de la terglobo. Krome, la homoj ĉiutage ekzercadas sian kruelecon pere de malhoma traktado de la bestoj. Tio ne okazas en la ĝangaloj sed plej ofte en la centroj de la tiel nomataj civilizo kaj kultura mondo.

Antaŭ kelkaj monatoj fine eksplodis skandalo pro la maniero en kiu oni traktas la ĉevalojn, eksportatajn el Pollando kaj kelkaj aliaj orienteŭropaj landoj al Francio kaj FR Germanio. Jen la rakonto:

Vi eble ne scias, ke okcident-eŭropaj buĉistoj ĉiujare importas pli ol 60 000 ĉevalojn por kontentigi gastronomiajn bezonojn de siaj klientoj. Pro komercaj aŭ doganaj kialoj, oni ofte intence vundas tiujn ĉevalojn antaŭ ol ekspedi ilin laŭ la longa vojo tra la kontinento al la, ekzemple, francaj buĉejoj. Oni enŝtopas po dudekon da ĉevaloj en neadekvatajn vagonojn aŭ kamionojn. Ligitaj, ili kontuziĝas kontraŭ la bariloj aŭ vagonvandoj. Kiam temas pri kamiona transporto, ili spertas ĉiun deklivon kaj vojkurbiĝon en la reliefo de Eŭropo.

Tiu malhome organizita vojaĝo ofte daŭras du semajnojn, dum kiuj la ĉevaloj restas ĉiam ligitaj sub la maldika lada vagon-tegmento, kiu somere kapablas provizi la temperaturon de plus 50 gradoj celsiusaj, kaj vintre glaciigita je minus dudek gradoj. Kvankam ekzistas amaso da leĝoj kaj preskriboj, kiel nutri la ĉevalojn dumvoje kaj kiel ofte prizorgi ilian soifon, regule okazas, ke pasas pluraj tagoj antaŭ ol aperas eĉ eta fojno-plado. Kiam la vojaĝo daŭras plenajn du semajnojn, nur unu-aŭ du-foje la bestoj ricevas iom da akvo. Eble ankaŭ vi ne scias, ke ĉevalo normale bezonas tri-dekon da akvolitroj en 24 horoj, ĉiutage.

Pro ĉio ĉi, nur ok el dek ĉevaloj atingas la celon de tiaj horrorvojaĝoj. Kaj el tiuj ok, nur kelkaj ankoraŭ estas en tolerebla stato, ĉar plej ofte temas pri


maljunaj ĉevaloj, kiuj pasigis sian tutan vivon fidele laborante por siaj mastroj.

Necesas pri ĉio ĉi paroli kun la kompetentaj instancoj, tiel en la eksportaj kiel en la importaj landoj. Necesas pri la skandalo atentigi la aŭtoritatojn en la ministerioj pri agrikulturo kaj transporto. Bezonate estas paroli al terkulturistoj, bestobredistoj, studentoj en agrikulturaj lernejoj.

Kial ĉevaloj dum sia lasta vojaĝo ne meritas la trakton, kiun ricevas la sudamerikaj bovoj, kiujn oni almenaŭ ne torturas sed buĉas tie, poste eksportante la viandon al Eŭropo.

Ekde la praepokoj, jam de jarmiloj, la ĉevalo estas unu el la ĉefaj kaj plej fidelaj kunuloj de la homo. Ĝi ankaŭ nun meritas pli homan kaj malpli bestan traktadon.

A. Bepperling,
fakdelegito pri sporto



**KIU ESTAS LA PLEJ FAMA
KRIMINAL-VERKISTO?
Kia demando! Kompreneble
JOHÁN VALANO**

Tion ja scias ĉiu. Sed ĉu vi scias ankaŭ, ke en 1981 vi povas legi kriminal-novelon de Johán Valano en ĉiu numero de

MONATO

internacia magazino sendependa

40 paĝoj DIN A4, riĉe ilustrita. Dek unu kajeroj jare. Jarabono 49,50 gmk aŭ 800,- bfr. La abonon bonvolu sendi rekte al la eldonejo: TK/Stafeto p.v.b.a., Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat, Belgio — aŭ mendu ĉe landa peranto aŭ UEA (52,50 gld.; por Nederlando 54,60 gld.). Kion krom noveloj de Valano vi povas legi en **Monato**, vi vidos petinte provekzempleron kontraŭ du internaciaj respondkuponoj. (Tamen memoru, ke unu persono povas nur unufoje fari tian peton.)

La inĝenia hidalgo

Don Quijote

de la Mancha

Tiu ĉi grava verko aperis en eldono "Fundación Esperanto" de Hispana Esperanto-Federacio (Eldona Fakto), Zaragoza. 820 paĝoj, formato 17,5x25cm., ilustrita, bindita. Prezo: 3 000 pesetoj (87,00 guldenoj), plus 10% por sendokostoj. Havebla ĉe Eldona Fakto de H.E.F., Inés Gastón, Pº de la Constitución, 35, 4º dcha., Zaragoza-1, Hispanujo, aŭ ĉe via libroservo.

La sola trivoluma (1300 paĝoj kun fotoj) movada kaj literatura

HISTORIO DE ESPERANTO

de L. Courtinat

Historio laŭ la kongresoj; recenzoj ĝis 1960. Mendebla ĉe UFE, 4 bis rue de la Cerisaie, F-75004 Paris, 50 ff plus afranko, aŭ ĉe la Libroservo de UEA.

SOMERO en GRESILLON

2a-22a de JULIO **PRELEGOJ**

S^{ro} ROLLINGER : islando inter fajro kaj glacio
kanariaj insuloj
la oriento

S^{ino} BEVERLING: praa kristana literaturo
kaj aliaj diverstemaj prelegoj kaj debatoj

23a de JULIO-12a de AUGUSTO

REKTMETODAJ KURSOJ

13a de AUGUSTO-2a de SEPTEMBRO

STUDADO kaj PRAKTIKO de la LINGVO

S^{ino} CHILDS-MEE seminario pri rektmetoda instruado
informoj, aliĝoj:

esperantista kulturdomo
kastelo Grésillon
49150 BAUGE Francio

SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ (5a sesio)
UNIVERSITATO DE LIEĜO (BELGIO)
05 - 19 de julio 1981

**S
U
K
,
8
1**

Sekcio E: Ekologio

1-a semajno: H. MARINOV (Bulgario),
 Sociekonomia bazo de la nuntempa
 ekologia krizo
 2-a semajno: H. MARINOV (Bulgario),
 Ekologiaj disponfontoj por elnutrado
 de la loĝantaro

Sekcio P: Pedagogio

1-a semajno: H. FRANK (FR Germanio),
 Propedeŭtiko de la klerigscienco
 prospektiva
 2-a semajno: P. DENOËL (Belgio),
 Elementoj de la homa fiziologio en
 rilato kun la edukado
 S. LEHRL (FR Germanio),
 Enkonduko en la informpsikologion
 kaj ties pedagogian aplikon

Ĉiu kurso estas semajna kaj ampleksas
 12 aŭ 18 lecionojn po 45 minutoj, kiuj
 okazas de lundo ĝis vendredo. Eblas sekvi
 unu aŭ plurajn kursojn, eĉ en ambaŭ
 sekcioj. Ekzamenoj. Kulturaj aranĝoj.
 Perfekta Esperanto-kurso.

KOTIZOJ: Programkostoj (unu kurso
 dum unu semajno): 1 200 bf; studentoj
 900 bf. Restadkostoj (sen tagmanĝoj;
 modifeblaj): ĉ. 2 500 bf semajne. Perfek-
 ta Esperanto-kurso (semajne): 500 bf.

*Petu detalajn
 informojn kaj
 aligilon ĉe:
 SOMERAJ
 UNIVERSITA-
 TAJ KURSOJ,
 Boîte Postale 9,
 B - Liège X,
 Belgio.*

Ĉu vi ŝatus profesie labori por Esperanto?

UEA serĉas novan oficiston por plenumi
 unuavice kongresajn kaj turismajn labo-
 rojn. Bezonataj kvalitoj estas iniciatemo,
 administra kaj komerca talento, kapablo
 bone rilati kun kunlaborantoj kaj repre-
 zenti la Asocion ĉe eksteraj instancoj,
 laŭeble sperto pri la vojaĝ-industrio, flua
 scipovo de Esperanto kaj eventuale de
 aliaj lingvoj.

Salajro estos interkonsentita. Posteniĝo
 eblas ekde oktobro 1981. Sinproponoj
 estu senditaj al la Direktoro de la Centra
 Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176,
 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Vi ne rezistos la tenton aĉeti tiun ĉi libron poste — antaŭmendu do ĝin nun je favora prezo!
Ĉefverko '81:

TUTMONDA SONORO

de K. Kalocsay

581 poemoj de 185 poetoj, verkintaj en 30 lingvoj! Du binditaj volumoj, sur 700 paĝoj!

K. Kalocsay

~~~~~

**TUTMO  
SONOR**

Poezia anto  
 en Esperan  
 tradukita el

**K. Kalocsay**

~~~~~

**TUTMONDA
SONORO**

Poezia antologio
 en Esperanto
 tradukita el 30 lingvoj

**Prezo: 66,00 gld. Ĝis 1981 06 30 eblas antaŭmendi ĝin pagante
 nur 54,00 gld., kio inkluzivas ankaŭ sendokostojn! Kiel antaŭpagi?**

1. Tiuj, kiuj posedas konton ĉe la CO de UEA, simple per UEA-pagilo ĝiru 54 gld. al la konto numero 2628 de Hungara Esperanto-Asocio, kaj samtempe sendu sian adreson kun la "Kopio por informo" al HEA (Eldona Sekcio), Pf. 193, H-1368 Budapest.
2. En kelkaj landoj funkcias perantoj:
 Finnlando: S-ro Lasse Kivistö, Kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51
 Hispanio: Heroldo de Esperanto, ĉe Banco de Bilbao, ag. 29, Madrid 16,
 cta 43 492 00 6727
 Japanio: S-ro Mine Yositaka, Kitahama-Kitawaki 29-16, TAKASAGO,
 Hyogo-ken, 671-01
 Nederlando: Eldonejo TK-Stafeto, n-ro 4174498
3. El ĉiuj landoj oni povas pagi al la jenaj kontoj:
 Belgio: Eldonejo TK-Stafeto, Bruselo n-ro 000-0422856-33
 Heroldo de Esperanto, Bruselo n-ro 000-0078887-26
 FR Germanio: Heroldo de Esperanto, Köln n-ro 194943-504

**La libro aperos en oktobro 1981. Ĉiuj antaŭpagintoj en Eŭropo ricevos ĝin ĝis la fino de ok-
 tobro, en aliaj kontinentoj ĝis la fino de decembro! Ĉar nepras havi ĝin, valoras antaŭmendi!**